6-a Jaro. N-o 293 APERAS  SEMAJNE Leipzig, 15./5. 1930

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerĥner

LA EVOLUO SEN DIO

Historio de l' evoluo

La evoluo estas doktrino entenanta, ke ĉiuj formoj de la vivo disvolviĝis sekve de laŭgrada alieciĝo el antaŭaj kaj pli simplaj formoj. *Ĉe la antikvuloj.*

La grekaj filozofoj Taleso, Anaksimandro, Heraklito kaj Empedoklo havis malprecizan ideon pri la evoluo, inkluzive la vivo kiel devena de la senanima materio, la postvivado de l' plej taŭgaj, la besta origino de l' homo. Aristoto kredis je la transformiĝo de l' specoj. La evoluo estis instruata de la grandaj Atenanoj de l' antikvo: Leŭkipo, Demokrito, Epikuro kaj precipe Lukrecio, la latina poeto.

Tiam aperis la kristanismo, kun sia malamo kontraŭ la rezonado kaj sia glorado al la kredo. La filozofio transiĝis de Eŭropo al Oriento kaj revenis, kiam la longa klerikala nokto estis forpelita, per la vojo de Hispanio. La regno de l' kristana teroro daŭris mil jarojn. Estis la Meza Epoko, la Epoko de l' mallumo. La scienco estis malpermesita: la religio regis kiel supera majstro.

Ĉe la modernuloj.

Meze de tiu ĉi mallumo aperis Koperniko, Galileo, Bruno kaj ili ekkriis: la steloj estas sunoj; la tero ne estas la centro de l' universo. Vanini venis poste, proklamante la gradiĝon de la vivoformoj. La morto permesis al Koperniko eviti la persekutojn, Galileo reprenis siajn dirojn. Bruno kaj Vanini estis vive bruligataj, la pastroj estis supervenkintaj.

Bekn (Bacon), Dekart (Descartes), Lajbnic (Leibniz), Jum (Hume) distingis konfuze la veron de l' evoluo. Bufon (Buffon) vidis ĝin klare, sed la timo antaŭ la pastroj devigis lin mensogi. Lia repreno kaj tiu de Galileo estas el la plej humiligaj dokumentoj, kiuj ekzistas. Laplas (Laplace) prezentis la nebul-hipotezon, tio volas diri, ke la planedoj devenas de fajra nebulaĵo. Lajl (Lyell) deduktis de la ŝtonegoj la antikvecon de l' mondo. Göte (Goethe), Erasmus, Darvin kaj aliaj defendis la leĝon aŭ planon de l' disvolviĝo, kiel oni diris tiutempe.

Lamark venis tiam kaj li kreis la doktrinon de l' Evoluo. En la jaro mem de la naskiĝo de Darvin, li atakis maltime la dogmojn pri la fikseco de l' specoj kaj la speciala kreado. Li la unua asertis kaj provis ĝin pruvi, ke la homo devenas de l' simio.

Kolektinte pruvojn depost dudek jaroj, Karlo Darvin, en 1859, starigis la veron pri la Evoluo per la publikigo de sia "Origino de l' Specoj". Hekel (Haeckel), la ateisto de Jena, faris pli ol iu ajn alia por popularigi la verkon de Lamark kaj Darvin: li ellaboris la genealogian arbon de l' homo, ĝenerale konsentatan en niaj tagoj.

Kia furiozego inter la religiularo! La klerikala reakcio estis preskaŭ unuanima. Eĉ scienculoj partoprenis en la atako. Virĥov (Virchow), kiu ĝoje akceptis unue la Evoluon, deklaris poste, ke "ni ne devas instrui, ke la homo devenas de l' simio aŭ de alia besto, ĉar tio estas danĝero por la ŝtato". Darvin konkludis sian verkon per tiu ĉi profetaĵo: "La lumo estos farita pri la origino kaj la historio de l' homo." Tiu ĉi aserto estis tiel multsignifa, ke la unua germana tradukisto ne reproduktis ĝin.

Necesis duonjarcento al la Evoluo por konkeri la sciencan mondon. En 1922 la Amerika Asocio por la Progresigo de l' Sciencoj deklaris, ke „ne ekzistas scienca ĝeneraligo, kiu estas pli forte subtenata de la faktaj evidentoj zorge praviĝitaj ol tiu pri la organa evoluo".

Resume, la Evoluo estas malkovrita de la antikvaj grekaj ateistoj kaj renovigita de la francaj ateistoj.

La pruvoj pri la Evoluo

1. La geologio: la atesto de l' steloj

La unua breĉo en la biblian kredon estis farata de la geologio. La muzeo de l' naturo, la etaĝoj de l' tera grundo, entenas la nediskuteblan pruvon pri la vero de l' Evoluo.

En la tavolitaj rokoj oni trovas la restojn de bestoj kaj plantoj, kiuj ekzistis en la epoko de la formiĝo de tiuj rokoj. En la tute malsupraj etaĝoj oni ne trovas fosiliojn. En la supraj etaĝoj aperas: — unue, la restoj de l' plej malaltaj vivoformoj — labirintodontioj, limakoj, koraloj — poste la fiŝoj kaj tiel plue ĝis inkluzive la primitiva homo. La intimaj rilatoj ekzistantaj inter la fosilioj de l' sinsekvaj etaĝoj povas esti klarigataj nur per rekta deveno.

La kontraŭ-evoluistoj liveras nenian klarigon. Kiam la fosilioj estis malkovrataj, la plimulto el la kristanoj insulte mokis pri ilia elterigo, sed kelkaj inter ili klopodis alĝustigi la faktojn al la kredo kaj tiu ĉi provo rezultigis la naskiĝon de l' monstra doktrino pri la *kataklismoj:* Dio kreanta la animalojn kaj detruanta ilin per katastrofoj tiaj, kiaj la diluvo, ilin renoviganta en diversaj periodoj, pliboniganta ĉiufoje iom pli la animalojn. Kun Kuvje' (Cuvier) ĉe sia pinto, la "repacigantoj" batalis fanatike por la doktrino de l' sinsekvaj kreadoj, sed estis frakasataj de la geologoj, sub la gvido de Lajl.

La karbo estas konsistigita per la fosiliaj restoj de densaj arbaroj. Kiu

povus nei tion, kiam estas plene videbla la enpreso de l' folioj kaj de l' filikoj? Kiu povas konsenti ankoraŭ, ke unukilometra vejno da karbo datas nur de sesmil jaroj? Peco da karbo entenas sufiĉe da dinamito pozitiva por eksplodigi la tutan biblion. La suno estas la fonto de l' vivo. Se vin tentas la bezono adori, kial vi ne adoras la sunon?

La krettavoloj, kies pluraj havas multe pli ol kilometron da diko, formiĝis el skeletoj de bestetoj demetitaj sur la fundo de l' maroj proporcie je la diko de paperfolio — t. e. 2,5 centimetroj en mil jaroj.

La Niagara-faloj foruzis 36 kilometrojn da ŝtonegoj. Proporcie je 90 cm po jaro necesis pli ol 30 mil jaroj por atingi tiun ĉi rezulton. Tio do estas la kvinoblo de l' biblia periodo.

Ĉar oni konas la tempon bezonatan de la uraniumo radioaktiva por dissolviĝi en plumbo, la aĝo de l' ŝtonegoj estas malkovrita per la rilataj kvantoj, kiujn ili entenas da tiuj metaloj. Laŭ tiu ĉi kemia horloĝo, la mondo aĝas pli ol miliardon da jaroj.

La geologio sufiĉis sola por elpruvi la Evoluon. La historio de l' ŝtonegoj ne povas esti remetata en dubon.

2. La disvolviĝo antaŭnaskiĝa

Dum sia disvolviĝo en la ventro de sia patrino, la feto (naskoto) pasas tra la diversaj statoj de animaleco, kiun trakuris ĝiaj antaŭuloj. En difinita momento la feto havas la brankojn de fiŝo, en alia momento ĝi posedas voston pli longan ol ĝiaj kruroj. Je ses monatoj dika felmantelo kovras ĝian korpon. Sinsekve la koro de l' homa embrio nombras du kavojn kiel fiŝo, tri kavojn kiel reptilio, kvar kavojn kiel mambesto.

Ĉe la vorto "Evoluo" la *Enciklopedio Brita* rimarkigas: "La fakto, ke birdo aŭ homo pasas tra stato, kie ĝia organizo estas esence tiu de fiŝo, ne havas ekzistrorajton, se oni ne konsentas, ke la vertebruloj teraj devenas de praaj fiŝformaj akvuloj" . . .

La membroj de grupo el parencaj animaloj similas inter si pli en la unuaj periodoj de sia disvolviĝo ol pli poste. En la unuaj fazoj de l' naskigo, la diferencoj estas sensignifaj. La embrioj de mambesto, de birdo, de serpento havas dekomence similan aspekton. Ĝis la kvara monato de l' gravedeco la embrioj de l' homo kaj de l' simio estas identaj.

Kial nei, ke la homo devenas de estaĵoj kun vosto, kiuj vivis depost miliono da jaroj, ĉar ja neniu homo nuntempa estas dotita je vosta aldonaĵo? Kial la kreduloj ne fondas kontraŭ-embriologan societon?

(Daŭrigota.) *Karlo Smith.*

El la franclingva gazeto "L' en dehors" tradukis N. B.

La militistigo de l' junularo en Italio

Kiel oni scias, la terora reĝimo de l' faŝismo en Italio povas tiel senĝene k brute estri, subpremi, supervenki la laboristarajn fortojn disigitajn en tiu lando, ĉar ĝi estas bazita sur la diktatura disciplino de l' faŝistaj partio k organizoj. Musolini bone scias, ke por povi regi absolute, oni bezonas obeeman, al ĉio pretan, spirite zorge preparitan instrumenton. Tial la faŝismo faras ĉion por krei la spiritan atmosferon, en kiu povas flori k prosperi ĝia reg-esprimo, la diktaturo. La faŝista partio estas grupiĝo fermita en si. Ne ĉiu, kiu volas, povas aliĝi. Por ĝin eniri, necesas esti preskaŭ de naskiĝo simpatiinta, plene konsentinta kun la reĝimo. Oni devis esti unue "balilla"[1] de ok ĝis dek kvar jaroj, tiam "avangardulo" de dek kvin ĝis dek ok jaroj, sekve esti ricevinta de sia infaneco fizikan, moralan k politikan edukadon, roman-imitan, kian ja celas la faŝisma doktrino.


La idoj de Musolini kiel gvidantoj en la faŝista infan-organizo

Unu fojon jare, kiam la dekok-jaruloj "avangarduloj" finis sian ekiron, plenumiĝas ceremonio nomata la *faŝisma kolektado,* kiun la reĝimo komparas kun antikva rito el la klasika periodo de Romo, kiam la maturiĝintoj forlasante la duonlongan robon, survestis la viran *togon* unuafoje. Per tiu ago la junaj romanoj fariĝis soldatoj, taŭgaj por servi al la patrio. Saman signifon havas la *faŝisma kolektado,* kiu ĉi-jare okazis je 27. aprilo per plej granda soleno. Ĉiu avangardulo ricevis la duoblan investon, civilan k militistan sub formo de matrikul-karto k pafilo. Same la kuniga insigno estis donata al li, nome de l' registara ĉefo, de milici-oficiro, k ĉiuj devis solenpromesi blinde obei la ordonojn de l' *Duce,* servi per ĉiuj fortoj, se necese, per sia sango al la faŝismo. Posttagmeze samtempe sur la tuta duoninsulo la okjaruloj estis akceptataj en la "Balilla", dum la pli aĝaj transiris el tiu infan-organizo en la "avangardon". Tiel de unu aĝo al alia la junulo estas envicigata en kvazaŭ-soldataj taĉmentoj.

Pro la ĉiujara ripetiĝo de l' ceremonio la bazo de l' piramido, sur kiu apogas sin la reĝimo, larĝiĝas pli k pli. En 1927 eniris 47 mil junuloj, en 1928, 79 mil, en 1929, 85 mil en la vicoj de l' partio k de l' milicio. La kontingento de ĉi tiu jaro atingas 95 mil junulojn, kiuj siavice helpos firmigi la regantan reĝimon. Rimarkinde estas, ke ĉi jare la ceremonion priskribita koincidas kun la surmaraj aspiroj de Italio, kiuj esprimiĝis tiel senvuale sur la marŝipa konferenco en Londono. Speciale gravaj solenoj okazis tiel kun la inaŭguro, de novaj kirasŝipoj en la diversaj havenoj ĉe la Adriatika maro. Cetere neniam depost sia pov-akiro la faŝismo malzorgis doni al la junularo la senton pri emo al mar-aferoj. Kvar ekzercŝipoj estis disponataj al "Balilla", k dufoje po jaro la registaro permesas al milo da avangarduloj longajn ŝipveturojn sur la Mediteraneo.

En la *faŝisma kolektado* de 1930 esprimiĝas la milita forto k la militista karaktero de l' faŝismo itala, la krima preparado de l' junularo en Italio por konker-militoj per venenigo de l' junaj mensoj en atmosfero de ŝovinismo k blindiĝo rilate al tutmondaj aferoj. Tiel longe, kiel la proletaro estas senpova kiel klaso en Italio, la nigraj fortoj de l' faŝismo povas senĝene furiozi tra la lando, malebligante al tuta generacio klare vidi sian situacion k kolektiĝi en la klasbatalan fronton kontraŭ la komuna malamiko de ĉiuj ekspluatatoj.

[1] Ano de "Balilla", organizo de faŝist-infanoj en Italio.



Ĉeeste kun grandaj spiritoj

Kio plej mankas al la socio nuntempe, estas liberaj animoj k firmaj karakteroj. Sur ĉiuj diversaj vojoj estas renkontebla: kadavreca, eklezieca submetiĝo, sufoka maltoleremo de la patrioj, stultiga unuecismo de la socialismoj; ni reiras al la grega[1] (aremaĉa) vivo. La homaro bezonas, kė ĝiaj amantoj kontraŭstaru tian vivkomprenon k ribelu kontraŭ ĝin, se necese.

Romen Rolan (Romain Rolland).

*

Ŝafpaŝtisto ĉiam bezonas kondukantan ŝafon, aliel li devus okaze esti mem ŝafo. *Niĉe* (Nietzsche).

*

La kontraŭdiro, la dekliniĝo, la serena malfido, la ironio estas signoj pri sano. Ĉio, kio estas absoluta, apartenas al la patologio. *Niĉe.*

*

La patrio estas terure malbela fetiĉo, al kiu homoj oferas siajn vivon, liberon k prudenton. *L. Tolstoj.*

[1] Grego = aro da brutoj.

Por- kaj kontraŭ-militaj agadoj en Estonio

(Daŭrigo. Vidu antaŭan n-on.)

2. Militedukado al estonaj junuloj ekster la lernejo

Burĝaj skoltoj k "lupidoj" verŝajne ekzistas en ĉiuj landoj k ĉiuj ilin ankaŭ konas. Ĉe ni estas krome organizo de naciaj skoltoj, eble ni diru — de ŝovinistaj skoltoj, t. n. "jun-forĝistoj". Ili havas preskaŭ saman uniformon kiel skoltoj, ankaŭ samajn leĝojn k ordonojn. Diferenco estas nur en tio, ke la "jun-forĝistojn" oni edukas en pli ŝovinista atmosfero ol skoltojn. Edukantoj kompreneble ankaŭ estas reakciuloj k oficiroj. Al skoltoj k "junforĝistoj" la burĝaj entreprenistoj donas multajn preferojn: ili eĉ multfoje ricevas senpage uniformojn. La nuna klerigministro, apartenanta al plej dekstra k reakcia partio, estas fondinto k gvidanto de l' skoltmovado en Estonio, sekve kompreneble li aprobas aliĝon de lernantoj al skoltaj organizoj. En multaj lernejoj la lernantoj neskoltoj eĉ estas persekutataj. Tamen la skoltmovado malkreskas. En ĝi aperis lasttempe eĉ kelkaj fenomenoj, kiuj ĝin tute ne montras en bona lumo. Kiel raportas tute neproleta gazeto, en Tartu la skoltgvidanto estis ŝtelisto; krom tio li eĉ estis gvidanta persono en loka Societo por Kristanaj Junuloj (YMCA)! Sed tio ne apartenas al mia temo.

La skoltaj k junforĝistaj organizoj estas por niaj patriotoj malgraŭ tio ankoraŭ tro radikalaj. Ĵus pretiĝis la fundamentaj ordonoj de "junaj agloj". Kiuj ili estas? Jam dum pluraj monatoj oni tamtamis en gazetaro k en radio pri la ideoj de "junaj agloj". Oni intencas organizi tutlandan asocion el junuloj de 9 ĝis 17 jaroj, kiu estu antaŭlernejo al soldat-servado. La tuta organizo dividiĝas en strangnomajn taĉmentojn: nestavoj, akcipitridoj, junakcipitroj, komencantoj, aglidoj, junagloj k junmagistroj. Por atingi la plej superan taĉmenton, oni postulas ekzercojn. Unu postulo ekz. estas: "Devas pafi el militpafilo 10 pafojn!" La "agloj" kompreneble havas uniformon, ornamitan per rubandetoj, bantoj, insignoj, steloj, ktp., por ke ili aspektu pli militistaj! Se en skolta movado tamen ekzistas memagado de junuloj, la "jun-agloj" estos entute edukataj laŭ fajfiloj de oficiroj k hejmdefendantaj instruktoroj. Jam la unua paragrafo de ilia regularo parolas, ke "jun-agloj estas edukataj kiel flamaj patriotoj", k, "ĉiu senvalora, internaciisma balasto forrestu el junagla organizo".

Kompreneble ankaŭ infanojn de laboristoj minacas la danĝero, ke ili povos esti kaptitaj de junagla brilanta ŝajn-oro k ke oni povos eduki ilin je malamikoj al siaj gepatroj-laboristoj, ĉar la burĝa lernejo ja preferas tiun ĉi fiorganizon. Sed ni, sennaciuloj, klopodas ĉiel kontraŭagi iliajn agmetodojn, organizante la laboristajn junpionirajn grupojn, kie ni edukas proletidojn en kontraŭ-milita k kontraŭburĝa pensmaniero. (Finota.)

15 428, Pärnu.

NOTOJ

Laŭ lastatempa statistiko la milionuloj en Granda Britio malpliiĝis nombre preskaŭ je cento dum la lastaj kvar jaroj, sed ilia tuta enspezo malpliiĝis nur je 4 681 376 funtoj sterlingaj (ĉ. 23,5 milionoj da dolaroj). Kontraste kun ĉi tiuj nombroj ni citu la mezajn semajnajn salajrojn laboristajn laŭ Laborministra informo. Dum jaro 1924 laboristoj ricevis 2 funtojn, 16 ŝil., 3 pencojn (ĉ. 10,80 dol.) laboristino havis 1 ft., 7 ŝil., 6 p. (ĉ.8,75 dol); en ŝtatokupo viro perlaboris 3 funtojn, 2 ŝil., 4 p. (ĉ. 16 dol.). Kaj en 1928 la sama perlaboris 3 ft., 3 ŝ., 9 p. En 1924 aliaj laboristoj ricevis 2 f., 11 ŝ., 1 p., en 1928 — 2 f., 11 ŝ., 11 p. En 1924 inĝeniero en ŝipkonstruado akiris 2 f. 14 ŝ., 6 p., en 1928 nur 2 f., 14 ŝ. En ĉiu okazo, kiam laboristino troviĝis en sama okupo, ŝi akiris sufiĉe malpli ol la suprecititaj salajroj.

La nombro de senlaboruloj registritaj en la Laborministeria Oficejo estis je 10. marto 1930: 1 563 800; tio signifas 294 961 pli ol en antaŭjaro je sama tempo.

*

Ĉe la Internacia Labor-Oficejo ekzistas abunda dokumentaro, verkita en 30 malsamaj lingvoj; ĝi okupas 400 oficistojn, respektive apartenantaj al 36 nacioj.

Nu, ĉu do vi kredas, ke tiuj 400 bone pagataj oficistoj deziras la enkondukon k aplikadon de esperanto? Tia "raciigado" okazigus la maldungon el la duono de ili... Estu for normigo k progreso!

2800.

*

La Universala Ligo por Seksa reformo sur scienca bazo invitas ĉiujn interesiĝantojn aliĝi al ĝia 4-a Kongreso, okazonta de 13.—20. septembro 1930 en Vieno (Aŭstrio). Plurlingva prospekto entenas la programon ankaŭ en esperanto. Parolados diversaj konataj scienculoj pri seksreformaj problemoj. Aliĝo por neliganoj: 15 mk. g. (aŭstrianoj 20 ŝil.). Kongres-oficejo: *Wien I/15,* Postfach 63.

*

En julio de l' nuna jaro okazos en Moskvo la 9-a Internacia konferenco de revoluciaj ministoj. La prezidantaro de l' Centra Komitato de Minista Unio en USSR decidis delegi al la konferenco laboristajn reprezentantojn el ĉefaj minejregionoj: Donbaseno, Ekstrema Oriento, Siberio, Baku, Groznij, Kazakstan. La C. K. konsideras dezirinda, ke en la delegitaro eniru ankaŭ reprezentantoj de ŝaktoj k minejoj, ĉe kiuj estas plej bone aranĝita laborista interligo kun eksterlandaj ministoj. Tiuj ĉi reprezentantoj havos konsilvoĉon. Do oni povas esperi, ke la konferencon ĉeestos kelkaj sovetiaj ministoj-esp-istoj, ĉar plej aktive internacia korespondado en Sovetio estas efektivigata per esperanto.

A. Sidorov, Rostov.

*

Kooperativoj kaj 1-a de Majo

En la unuamaja festotago de l' laboristaro kompreneble la servistaro de kooperativo ankaŭ deziras partopreni. Pro tio ni (temas pri kooperativ-servistoj en Holando) kunvenis k pere de la sekcia sekretario de nia meti-organizo proponis al la estraro de la kooperativa entrepreno fermi la tutan aferon pro la maja festo. Ni opinias, ke entrepreno direktata de laboristoj k servanta nur laboristojn devas partopreni la laboristan festotagon per fermitaj oficejoj k butikoj. La estraro pro ekonomiaj konsideroj nun ne konsentis, starigante komisionon por pristudi ĉi-jare la problemon. Tamen 25 el la servistaro, ĉefe pandistribuantoj, decidis je propraj kostoj ne labori tiun tagon, kion la estraro ne malfavoris. Nun estas mia demando: kiel oni traktas tiun aferon en kooperativoj de aliaj landoj? *E. Zachte (14 562), Amsterdam.*

Per la rapida plibonigo al ĉiuj produktiloj, per la senfine plibonigitaj komunikiloj la burĝaro entiras ĉiujn naciojn, eĉ la plej barbarajn, en la civilizon. La malkaraj prezoj de ĝiaj varoj estas la peza artilerio, per kiu ĝi disfrakasas la ĉiniajn murojn, per kiu ĝi venkas la plej obstinan fremdulmalamon de la barbaroj. Ĝi devigas ĉiujn naciojn alproprigi al si la burĝan produktmanieron, se ili ne volas perei; ĝi devigas ilin la t. n. civilizon enkonduki ĉe si mem, k sekve fariĝi burĝaj. Per unu vorto, ĝi kreas al si mondon laŭ sia propra bildo.

K. Marks k F. Engels
en "La Komunista Manifesto".

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA LERNANTO"

LA TRAGEDIO EN USONA MALLIBEREJO

La lastdata tragedio en la granda kapitalista malliberejo — en Ohajo (*Ohio*), montras ree la krimojn de l' kapitalista ordo en akra lumo. Ĉi tie oni tute ne interesiĝas pri la estonto de tiuj, kiuj estas kaptitaj per la estraro k enkarcerigitaj en malliberejoj. Oni rigardas malliberulojn kiel "malbonajn" homojn, k nur deziras forgesi pri ilia ekzisto. Ĉu vi estas krimulo aŭ ĉu vi estas revoluciulo, nenia diferenco: Vi estas perdita homo por la socio, vi ne plu ekzistas...

Ekzemple, K-do Tomaso Muni (*Tom Mooney*) ankoraŭ estas en malliberejo, ankaŭ Ŭarn Bilings (*Warren Billings*); ilia senkulpo estas tute klara k pruvita, sed ili restas dekkvaran jaron en la karcero k nenio estis farata por liberigi ilin. La propagando por ilia liberigo estas tre limigita, nur revoluciemaj K-doj scias pri la krimo de l' kapitalista ŝtato.

La Ohajo-malliberejo estis konstruita en 1830, por 1500 malliberuloj. Tamen nun ekzistas manko de laboro, multaj laboristoj serĉas netroveblan laboron k ne havante ian asekuron, ili ŝtelas. Negroj estas linĉataj, blankhaŭtuloj estas enkarcerigitaj por longaj periodoj. Tial la karceroj ne plu havas sufiĉan spacon por la kreskanta amaso da krimuloj, k nun ni trovas en la sama ejo konstruita por 1500 homoj, — *4300* malliberulojn.

Tamen ne pensu, ke la ŝtato mem ne havas monon. Tute ne. Sed la politikistoj neniel zorgas pri la "falantaj homoj", ili ege disputas la "malpermeson de alkoholo", ĉar ĉiu trinkas k tial bezonas pli malkostan trinkaĵon. Sed kiun interesas la krimuloj? Ni rigardu la financan staton de la ŝtato Ohajo.

En 1922 (je la lasta kalkulo, nun certe ĝi estas pli riĉa) la tuta riĉo estis $ 18 498 552 000. La jara buĝeto estis $ 40 138 182, k la tuta ŝuldo estis $ 10 milionoj. Certe ili povus pli bone zorgi pri la situacio de malliberuloj, sed ne pensu, ke sataj kapitalistoj estas interesataj pri tiuj homoj, kiuj ne donas profiton. Jes, nun ili estos devigitaj konstrui alian pli bonan, novan malliberejon, ĉar preskaŭ la tuta mondo parolas pri la malbonstato de l' malliberejoj en Ohajo. Tamen ne pensu, ke aliaj malliberejoj estas multe pli bonaj...

Mi jam estis en multaj malliberejoj en Novjorko — la plej progresema ŝtato, k mi povis konstati, ke ĉiu nur estas por firme gardi la krimulon, sed neniu estas bone konstruita por gardi la vivojn de l' enkarcerigitaj homoj. Ĉio estas malpura, ankaŭ la manĝaĵo, kiun vi ne povas manĝi, eĉ se vi estas malsatega. Por mono vi povas akiri ĉion (pagante trioble pli ol la vera kosto); sen mono vi akiras nenion.

Laŭ la rakonto de unu malliberulo, tumulto okazis tri tagojn antaŭ la brulego (pri kio nenio estis raportita) en la manĝejo, pro la manko de manĝaĵo. Sed laŭ liaj diroj oni sendis noton al aliaj personoj k tiu ĉi noto estis kaptita de l' gardistoj. Tamen ili akiris gazolinon (flamigeblan oleon) por komenci la krimbruligon, kiu okazis tri tagojn poste.

La malliberuloj jam multfoje plendis, ke ili ne estas nutrataj, ke ili devas pagi por ĉio, — por ricevi manĝaĵon, por akiri lit-kovrilon, por esti rekomendata al pardono (laŭ parolo), ĉar la gardistoj vendas ĉion, kio estas preparita por la malliberuloj.

* * *

Nun la brulego mem. La ĉefgardisto Tom's *(Thomas)* laŭ la gazetoj estas la plej sperta. Tamen dum la 15 jaroj, en kiuj li estis en malliberejo de Ohajo, li neniam instruis siajn gardistojn kion fari, kiam brulego okazus. Nenia ŝirmo estis en la malliberejo kontraŭ, brulado — ĉar "fajra brigado povas alveni post du minutoj" (laŭ respondoj de Tom's).

La ĉefgardisto sendis alarmon el la eksteraĵo de l' malliberejo, tiel perdante tempon. Li ordonis, ke neniu estu liberigata, ĉar li timis, ke multaj uzos la okazon por forkuri.

Kiam la unua brulego estis estingita, du aliaj ekiĝis en aliaj partoj de la malliberejo. Kiam ili estis devigitaj ellasi la malliberulojn, oni ne povis trovi la ŝlosilon ktp. La tragedio — 319 mortigitoj, okazis pro la malzorgado, pro la deziro gardi la homojn malliberaj anstataŭ savi ilin. La kulpo estas en la kapitalisma ordo, kiu kreas tiun moninterespn k devigas aliajn pli malgrandajn servantojn — ilojn — gardi tiun ordon. Tamen la gardistoj estas ankaŭ kulpaj pro sia malzorgemo pri la vivoj de malliberigitoj.

Oni nun esploras la tragedion por trovi la kulpajn, la ĉefgardisto estos fordungita ien ajn, ĉar la malliberuloj estas pretaj disŝiri lin pro kolero. Sed oni maldungos lin, kiel ĉiam, kun la honoro, ke li faris sian devon...

SAT-ano 13 835, Novjorko.

Al la 70 j. naskiĝdato de Zamenhof (1859—1929)

ZAMENHOF

de E. DREZEN

Eldono de SAT

La mondkoncepto de Zamenhof. — Zamenhof kiel iniciatinto kaj teoriisto de esperanto

49 pĝ. — Form.: 13×17 cm.

Prezo: 0,70 mk. g.

Administr. de SAT
Colmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germ.)

PRI KIALO KAJ CELO DE LA VIVO

Filozofia Disertacio

La fama maljuna anarkisto Sebastjen For (Sebastien Faure) faris lastatempe en Marsejlo (Marseille) longan paroladon pri jena temo: "Mi ne plu estas dikredanto, mi kontraŭbatalas la religiojn". Jam de pli ol 50 jaroj la tre elokventa oratoro debatas pri la sama temo, k tiu lia parolado kondukis min al jenaj pripensoj.

Ofte, oftege, oni diskutas pri dio k la eblo de ĝia ekzisto, k ĝenerale neniam oni akordiĝas pri tio. Multegajn diskutojn pri tiu temo mi aŭdis, k mi rimarkis, ke la dikredantoj eliras el tiuj debatoj preskaŭ ĉiam dikredantaj k la ateistoj ĉiam ateistaj. Mi do demandis min: Ĉu estas nepre utile diskuti? Ĉu ne estas tempo perdita? Mi opinias, ke jes, ke nian energion k tempon ni devas utiligi por pli seriozaj aferoj.

Mi renkontis en la vivo bonajn k malbonajn homojn en ĉiuj medioj, en ĉiuj rondoj mi konsekvence opinias, ke ni devas atenti en homo ne ĝian kredon, sed ĝian konduton.

Laŭ mi, tiom longe kiom oni ne povos klarigi la devenon de la homo k ĝian kialon, ĝian estonton aŭ finon, tiom longe kiom oni ne havos pri la universo, la kosmo, sciencan aŭ kontentigan klarigon, oni ne povos tute forigi ĉe la homaro aŭ almenaŭ ĉe parto el ĝi la "mistikan senton". Mi estis tentata diri la *religian,* sed mi hezitis, ĉar miaopinie religia sento devas nepre ekzisti. Mi klarigas.

Ofte, oni ne akordiĝas, ĉar oni ne taksas la vortojn laŭ sama senco. Ni parolis supre pri dio; nu, petu dekon da dikredantoj, kiujn vi elektos hazarde, ke ili donu al vi skribe difinon pri dio, k komparu poste tiujn difinojn; vi estos tute surprizitaj pro la diferencoj k malsamaj konceptoj. Pri multaj vortoj k esprimoj estas same.

La vorto "religio" originas el la latina lingvo: *Religare.* Ĝi entenas la prefikson *re* k la vorton *ligare,* kiu signifas *ligi;* tiu vorto etimologie signifas do, *kio kunigas,* k ĝi entenas en si nenion "dogmecan". Kiam oni demandas min "Ĉu vi estas religiema", mi respondas: "Jes, sed mia religio estas tiu predikata de *Jesuo Kristo* (se oni allasas, ke tiu viro ekzistis); ĝi *estas la universala frateco de la homaro.* Kompreneble, ke ĝi havas nenion komunan kun tiuj predikataj de ĉiuj ekzistantaj religioj, kvankam la plej disvastigita el ili, la katolika religio[1], pretendas esti fondita de *Jesuo Kristo* mem.

Do, kiun ajn ni renkontas, ĉu dikredanton, ĉu ateiston, ni demandu lin: "Kia estas, laŭ vi, la kialo de l' vivo k ĝia celo? Kion ni devas fari sur la

[1] La aŭtorino iomete eraras tiurilate. — *Red.*

terglobo, sur kiu vole nevole ni vivas? Kian konduton ni devas sekvi? Jen kio gravas, multe pli ol tio, kion vi kredas aŭ neas.

Persone, mi respondas jene tiujn demandojn: "La celo de la vivo estas la eltrovo de ĉiuj leĝoj, kiuj regas la universon." "La devo de la homo, la konduto, kiun li devas sekvi, estas "fari bonon".

En la universo, ĉio estas leĝeca, ĉio obeas al leĝoj. Kiam oni konstatas novan fenomenon, oni klopodas eltrovi la leĝojn, kiuj ĝin regas. Tio, kio ne estis klarigebla hieraŭ, estas klarigata hodiaŭ, dank' al la senĉesaj eltrovoj de la scienco. Multaj fenomenoj ne klarigeblaj hodiaŭ, fariĝos tiaj estonte pro la samaj motivoj. Kiam la homo konos ĉiujn leĝojn, kiuj regas la universon, li estos tiam vera mastro de la mondo k tute libera.

Fari bonon estas, por la homo, ĉion fari laŭ siaj kapabloj por malpliigi la suferojn de la homaro k konsekvence pliigi ĝiajn ĝuojn.

Se homo konsentas pri tiuj konceptoj k laŭcele kondutas, estas tute egale ĉu li estas materialisto aŭ spiritualisto.

Kompreneble, ke oni povas multe longe diskuti pri la diversaj manieroj "fari bonon". Laŭ mi, alia trafa difino estas ankaŭ la jena: "Fari bonon estas antaŭ ĉio, ke ĉiu perlaboru sian propran vivon, neniel vivu parazite . . .

Tranĉilo (1255).

EKLUMOJ SUR LONDONON

Certe la angla ĉefurbo prezentas belajn konstruojn allogajn vidaĵojn, tamen por SAT-vizitanto ĝi ankaŭ havas aliajn klarigindajn flankojn. Ni penu do reliefe elmontri kelkajn; por tio hora marŝado tra la civita centro tre bone taŭgos.

Nia komenca punkto, la verda spaco Hajd-Parko *(Hyde Park),* estas famekonata pro siaj plenaeraj kunvenoj ĉiuspecaj. Vespere, dum bela vetero, adeptoj de politikaj, faŝistaj, religiaj k. s. movadoj, kolektiĝas grupe por disdonadi klerigan lumon. Laŭte, longe la parolantoj penas interesi, persvadi k konvinki la ĉeestantaron; ke ili posedas ĝis forta grado konvinkon pri la propra doktrino, ili okaze evidentigas interbatalante per materialaj iloj. Vespero tie eluzita ne estas perdita, sed ni plueniru laŭ Oksfod *(Oxford)*-strato.


Foirtago en laborista kvartalo de Londono

Ĉi tiu vojo kun la meze kruciĝanta strato de Riĝnt *(Regent),* entenas plejparte luksaĵ-butikojn, en kiuj laboristo ne kutime elspezas sian monon. Ĉe fino de l' Oksfod-strato, rektangule, kuŝas Ĉaring Kros Rod *(Charing Cross Road),* foje interesa; se oni havas kelkajn superfluajn monerojn, tiam el la "malkaraj skatoloj" de arigitaj librovendejoj oni eble elfosos iom ĉifonitan, tamen legindan verkon. Inter multe da trafiko ni nun laŭiras straton de Nju Oksfod *(New Oxford),* ĝis ni atingas la kunvenejon de la Londona SAT-klubo en Haj Holbon *(High Holborn).* Ĝi estas ĉambro en la plej supra etaĝo, super banko. Staru ekstere iun sabatan vesperon post la dudeka horo, k se vi ne eksentas elradiitan veron, ni ne estas kulpaj, ni ĉiam penegas.

Preterpasante Haton Gadn *(Hatton Garden);* kie lokas sin juvel-negocistoj, laŭ elmontrita tabulo ni ekscias, ke inter la diamantoj ankaŭ troviĝas ejo de la diamantoj, verŝajne por spiti tentadon. Alvenante Faringdon-straton ni estas apud Smitfild *(Smithfield),* granda viandmerkato. Sabate, vespere, oni el butikoj foraŭkcias reston de la viando. Vendantoj laŭde proponas la varon, samtempe frap-frapante per malpuraj manoj la pecaĉon. La ĉirkaŭantaj malriĉulinoj aŭskultas, vigle perokule taksas la valoron de proponataĵoj, sed ĉiufoje atendas la kutimajn prezmalpliigojn, ĉar gravegas, ke ili tre zorge elspezu malfacile gajnitan monon.

Parenteze mi klarigu, ke en Anglio estas ankoraŭ kutimo por kelkaj profesioj uzi atentigan indikilon. Ekz. barbiroj, super la pordo pendigas ruĝe, blanke, blue koloritan bastonegon; en montro-fenestroj de drogistoj vidiĝas tri aŭ kvar botelegoj entenantaj koloritan akvon. Ruĝa lampo ofte staras antaŭ domo de kuracisto, k tri elpendigitaj latunaj pilkoj signifas prunt-donejon. Se iam trafus vin financa krizo, tie oni, kontraŭ depono eble de via libera ĉemizo, pruntos iom da mono. K-do Krjukov en sia normiga artikolo proponas bluan koloron por reprezenti feliĉon, tamen se blua antaŭdoma lampo trafus vian okulon, ne alkuru atendante ekstazan bonvenon, ĝi nur indikas policejon.

De Faringdon en Flit *(Fleet)*-straton hejmo de ĵurnalismo kun atmosfero distinge peza. Kompreneble se oni konsideras la amason da kontraŭproletaj mensogoj ĉiutage elŝutataj, tio tute ne mirigas. Kelkaj novaj domegoj nun en stato de konstruado montras, ke ĝi estas profitiga industrio. Alvenante bone konatan vojon Strand ni preterpasas interspace du preĝejojn forigendajn, ili kuŝas meze de la ŝoseo, kaj tiu bela malnova konstruo, antaŭ kiu staras mizerulaĉo vendante alumetojn, estas la "Reĝa Korto de Juĝpovo". Trafalgar-placo, la fino de nia marŝado kuŝas antaŭ ni. Sufiĉe vasta areo kun altega kolono centre je honoro de mortinta admiralo, ĝi jam multfoje estis la sceno por proletaj manifestacioj. Iutage ni esperas, ke ĝi vidos egan manifestacion, kiu signifos enkondukon de nova sociordo. Nia kongreso, al kiu ni bonvenigos ĉiujn, vigle laboru por ties plenumo.

Radeto (10 080).



Pecetoj de l' historio k filozofio

La historio de l' homaro pruvas al ni la fakton, ke la skolastika filozofio kun sia aprioria principo alkondukis la homaron en diktatorecon de l' pastraro, kun ĝiaj abomenaj rekvizicioj, inkvizicio, krucmilitiroj ktp. Ĉi tiu principo baziĝas sur la individua imago k aserto; ĝi solvas la problemojn sen iuj ajn provoj per la revoj de l' aŭtoritatulo, kiu proponas la solvon, defendas ĝin kiel sole ne disputeblan rimedon k bonaĵon. Tial tiuj agmanieroj ĉiam kondukas al la ordo de absoluteco k aŭtokrateco . . . Sed la aposterioria filozofia principo de K a n t *estas sendube liberala. Ĝi kondukas al la sciado k decidoj pri la problemoj ne per subpremado, sufokado k silentigado al la kontraŭaj pensoj, sed ĉiuflanke kontrolas la faktojn, prijuĝas senpasie ĉiujn elementojn de l' problemoj, eltiras taŭgajn k raciajn lecionojn, ke ne estu eraroj k perforta tendenco.* *Mat. Rib.*



POR NIA DISTRO

En kunveno de patriotoj

La oratoro: "Ni ĉiam estis pretaj, kiam la patrio estis en danĝero! Tiam ni ĉiam staris . . ." (Voĉo de la salonservisto:) "Ne restu starantaj malantaŭe, sinjoroj, bonvolu iri antaŭen, pli antaŭen!" *Trad. 3018.*

Kongresontoj! Ne forgesu aliĝi kiel eble plej baldaŭ al la X-a Kongreso en Londono!

Esperanto-Servo

N-o 33 — 4-a jaro Gvidanto k kompilanto: O. BÄSSLER, Ebermayer-Str. 8, I, Leipzig C 1 (Germ.) 15. Mai 1930

EL RUMANIO

Agado de faŝistaj studentoj kontraŭ laborista movado

232 (Esp.-Servo.) La studentaro en ĉefurbo Bukarest kunvokis tutlandan studentaran kunvenon, kiun ĉeestis delegitoj el ĉiuj studentorganizoj. La kunvenintaro akceptis jenajn rezoluciojn: 1. oni devas fermi la landlimojn por ĉiuj fremduloj, ĉar nur tiel oni povas ŝirmi sin kontraŭ enŝteliĝantaj kom. agitantoj; 2. en komuneco kun ĉiuj studentaj organizoj de la lando oni devas fondi "feran armeon". Ambaŭ rezolucioj klare montras, ke ili celas nur batalon kontraŭ laborista movado. Post la kunveno la studentaro manifestaciis, samtempe disdonante flugfoliojn kun teksto: nian amikan manon ni devas doni unu al la alia, ĉar nin ligas noblaj agoj por malvenkigi la filaborojn de agitantoj pagitaj de bolŝevikoj . . . (ĉi afero okazis en komenco de aprilo). Post ioma tempo ankaŭ en Timiŝurbo (Temeŝvar), ripetiĝis tia manifestacio. Antaŭ la universitato la studentoj okazigis kunvenon, proklamante batalon, por malhelpi ke kom. urbkonsilantoj eniras la urbdomon. Ankaŭ en urbo Arad kelkaj faŝistaj patriotaj studentoj (ĉ. 50) kunvenis antaŭ la urba domo k fikriadis: „Jas cu Comunismo" (for la komunismon); ili ankaŭ subtenis la batalon kontraŭ "religiaj persekutoj en Sovetio". Sed la malmultaj scivolemaj aŭskultantoj fajfis k kraĉis al ili. Jen kiel evoluas "demokratio" en Rumanio. *Role.*

Tio ja ne estas subpremo . . .

233 (Esp.-Servo.) Angelescu, la ministro por internaj aferoj, donis publikan ordonon rilate al 1-a de majo. La socialdemokrata estraro longan tempon traktis kun li. Ĉiuj surstrataj manifestacioj estis severe malpermesitaj por soc. k kom. Post intertrakto de la soc. estraro fine estis permesita kunveno k parolado en urba arbareto en ĉiu urbo, sed nur por socialdemokratoj. Komunistoj do ne rajtis manifestacii. *Role.*

EL BULGARIO

La "lasta" restaĵo de kom. organizoj

234 (Esp.-Servo.) Ĉiam, kiam la polico sukcesis kapti iujn Gek-dojn el la legala movado, ĝi fiere deklaris: nuligitaj estas la lastaj restaĵoj de la komunista konspiro en Bulgario. Sed, ho ve! Ĉiam la kom. organizoj daŭrigis sian agadon. Lasttempe la polico faris novajn "grandegajn" malkovrojn. Arestitaj estis ĉ. 40 Gek-doj (laboristoj, studentoj, unu lernantino ktp.). Preskaŭ ĉiuj el ili estis sovaĝe batitaj en la Direkcio de polico. Al K-do D. Angelov estas rompita la mano. Entute la plimulto el la arestitoj estis tiel akre batitaj, ke la polico tenis ilin ĉe si ĉ. 40 tagojn (la laŭleĝa tempo estas 20), por ke iliaj vundoj malaperos antaŭ ol la Gek-doj estu transdonitaj al la prokuroro. Nun, la 25-an de aprilo la polico jam finis sian laboron k akuzas je partopreno al Komjunulara Unuiĝo k Kompartio 18 personojn, inter kiuj 9—10 kiel organizantoj k la restintaj kiel simplaj membroj. Do, nuntempe, post la "sukcesplena" agado de la fama bulgara polico, ne ekzistas komunistaj organizoj en Bulgario . . . La polico ja opiniis (?!) tiel. Ĉe la malkovro estis malkovrita la nelegala multobliga presejo en la domo de la plej granda bulgara banko. La polico eble opiniis: jam la komunistoj ne havos eblecon presigi nelegalajn alvokojn. Sed, ho ve! — alvenis la 26-a de aprilo, k ĉiuj loĝantoj de Sofia trovis antaŭ siaj pordoj plej diversajn *nelegalajn* alvokojn okaze de Unua de majo. Estis eĉ io, kio treege ĉagrenigis la policon: krom la alvokoj de la kom. partio k de la Ruĝa Helpo, kiuj estis multobligitaj, estis ankaŭ presitaj per presej-maŝinoj alvokoj de la Komjunularo . . . Kiel vi vidas, certe malaperis post la lasta malkovro "la lastaj restaĵoj de la komunista konspiro". *G., Sofia, 26. 4. 30.*

EL FRANCIO

"Libereco" en Francio

235 (Esp.-Servo.) Ĉu vi, tutmondaj K-doj, aŭdis pri afero Almazian en Parizo? Polico enkarcerigis la "fremdulon" Almazian, ĉar iu amiko de Almazian, Rigaudin (Rigoden'), estis murdita antaŭ kelkaj semajnoj. (Tre verŝajne estas, ke polico mem murdis Rigaudin, ĉar tiu Rigaudin, anarkisto, estis miksita kun tuta familio en dummilitaj skandaloj pri Malvy, Caillaux [Cajo'], "Bonnet Rouge" ktp.). Policanoj prezentis kontraŭ Almazian multajn pruvojn. Sed, tute hazarde, advokato de Almazian estis lerta sincera junulo. Hazarde kelkaj talentaj gazetistoj interesiĝis pri tiu polica "eraro". Oni pruvis, ke ĉiuj pruvoj de policanoj ne estis pruvoj, sed mensogoj. Tuta Parizo, k Francio, emociiĝis. Plenplenaj salonegoj kun 5000, 10 000 aŭskultantoj postulis "ĝustan ĝuston", honestan enketon pri tiu afero. Policanoj prezentis novajn pruvojn kontraŭ Almazian, sed tuj tiuj pruvoj montriĝis novaj mensogoj. Protestado de Pariza publiko kreskis. Talentega oratoro Georges Pioch (Ĵorĵ Pioŝ') skribis, ke oni rekonis la Parizon de Afero Dreyfus (france prononcita Drefüs, germandevena juda nomo Drajfus). Kiel dum afero Dreyfus, dekstraj gazetoj subtenis policistojn k juĝistaron, laŭ la ĉiama burĝa principo: "plej bone kondamni senkulpulon, ol konsenti ke policanoj k juĝistoj eraris". Fine maldekstra gazetaro venkis. Almazian estis liberigita. Sed . . . Sed, dum la tuta maldekstra gazetaro amuzigas la francan publikon pri la senkulpeco de la sola Almazian, centoj da nekulpuloj suferas en armeaj, koloniaj k metropolaj karceroj. Pri senkulpeco de tiuj malliberuloj "maldekstra" demokrata k dem.-socialista gazetaro ne protestas: *ĉar tiuj senkulpuloj estas komunistoj.* *J. F., Parizo.*

EL USONO

Egalaj ŝancoj por ĉiuj homoj

236 (Esp.-Servo.) En ĉiutaga usona gazeto aperis tipa anonco, kiu klare montras, ke la kapitalismo preferas junajn fortojn, ke ili nur cedas ĉi-foje certagrade, ĉar ili nepre bezonas administrantojn. La anonco tekstas: "La Granda Atlantika k Pacifika Teo-Kompanio, kiu havas plej grandajn podetalajn spicistojn en la mondo, bezonas spertajn spicbutikajn k viandvendejajn administrantojn. Oni devas posedi sekvantajn ecojn: Petanto devas esti blankhaŭtulo, posedi almenaŭ kompletan altlernejan edukadon, preferas homon edziĝintan, devas posedi kontentigan rekordon de kontinua servo k devas esti enloĝanto de (urbo) Los Angeles aŭ de proksimo por ĉeesti ĝustatempe. Ĉiuj spicbutikaj administrantoj devas posedi plenan konon de prizorgo k manuzo de freŝaj fruktoj k vegetaĵoj. Ĉiuj viandvendejaj administrantoj devas posedi bonan rekordon rilate volumenon k profitofaron. Neniu petanto estos konsiderata, kiu havas pli ol 35 jarojn. Relegu la kondiĉojn k se vi ne posedas niajn bezonaĵojn, ne malŝparu vian k nian tempon. Ĉiujn petojn oni nur sendu per poŝto; ni ne atentas personajn petojn. Se via letero estas kontentiga, ni aranĝos intervjuon en proksima estonto." *J. E., Los Angeles.*

EL SOVETIO

Viktimo de religia fantikeco

237 (Esp. - Servo.) La gepatroj de Klavdio Semenova en urbo Gorohovee, kiuj malliberigis nomitan filinon (legu raporton 217 en antaŭlasta n-o), nun estas kondamnitaj de distrikta juĝejo en Vladimir. La verdikto ekzilas la estintan faman ŝipkomerciston Semenov kun lia edzino post limojn de l' distrikto dum 5 jaroj k konfiskas ilian tutan havaĵon. (Certe tiu verdikto estas plenjusta, sed ŝajne eĉ tro humileca — la kompilanto.) *Sidorov, Rostov/Don.*

mezo, kiam la suno brulis per sia plena forto, la mastro de l' azeno kaj la vojaĝanto haltis kaj disputis pri tio, kiu profitus el la ombro, kiun donis la korpo de l' besto.

— Mi luigis al vi mian azenon kaj ne ĝian ombron, diris la unu.

— Ne, kontraŭrespondis la alia, mi faris negocon pri la tuta besto...

En tiu momento Demosteno interrompis sin, kaj la amaso, vive interesita, postulis per laŭtaj krioj la daŭrigon kaj la finon de l' historio.

— Nu, kio! ekkriis tiam Demosteno, — la ombro de azeno interesas vin tiagrade, kaj, kiam mi parolas al vi pri viaj plej karaj interesoj, vi apenaŭ konsentas min aŭskulti!

La Atenanoj komprenis la lecionon, sed neniam eksciis la finon de l' historieto! *M.*

KIEL MI FARIĜIS ESPERANTISTO

En jaro 1909, en novembro, venis mia edzino hejmen el la laborejo (mi memoras, ke ni manĝis terpomojn kaj haringojn), kiam ŝi ekparolis pri nova lingvo, esperanto. Mi neniam aŭdis pri ĝi. Ŝi sugestis, ke ni vizitu samvespere esperantan lernrondeton. Alveninte, ni trovis dek gelernantojn. Ni aĉetis lernlibron por dudek fenigoj. Dum tri vesperoj ĉiuj venis, poste nur tri, fine mi restis sola kaj mi estis devigata lerni esperanton hejme kun mia edzino. En decembro 1909 mi komencis korespondi. La tuta mondo estis malfermita al mi, dank' al nia kara majstro d-ro Zamenhof.

Kaj poste dank' al nia fervora esp. pioniro Julius Pacelt *(Patzelt)* el Obergrund en germana parto de Bohemio, kiu mortis dum la milito en aĝo de 69 jaroj, kaj al kiu mi konservas bonegan memoron kiel tre kapabla esperanta instruanto. Lia patro Antono Pacelt, ĉe kiu li lernis fari veluron kaj horloĝojn, estis tre klera kaj humana homo. La filo lernis stenografion, volapukon, poste esperanton. En sia metio li konstruis mem telefonojn, elektrajn horloĝojn ktp. Kiel bona biciklisto, li ofte laboris malproksime en Bohemio, Moravio kaj ĉe la hungara limo, dum monatoj; li ofte biciklis 150—220 kilometrojn dum unu tago. Multajn esp. grupojn li fondis en Bohemio, ankaŭ en Saksio, en la limregiono. Se Pacelt ne venus al Valtersdorf, mi kredas, ke mi ne estus lerninta esperanton en 1909. Tial li estis mia vera esperanta "patro".

Ĉiutage mi lernis novajn esp. vortojn. En jaro 1922 mi eksciis, ke ekzistas SAT, de K-do Boras el Hispanio, kaj tiel mi aliĝis al SAT. Poste mi konatiĝis kun K-do Ŝerbaŭm, kaj ni interparolis pri fondiĝo de Orient-Saksia distrikto (1923). Ni havis bonan sukceson dank' al K-do Guhr k: a. En la ĉefkunveno de SAT-anoj el la orient-saksia distrikto en decembro 1928 ĉeestis 39 K-doj.

Ni ne forgesu, rikoltante sukcesojn hodiaŭ, la malnovajn pionirojn, kiuj preparis la kampon por nia laboro, kaj inter ili ŝenlacan propagandiston *J. Pacelt.* - *1225.*

Por nia Distro

Solvoj el la antaŭa n-o:

Lilio, oleo, naiva[1], depeŝo, oazo, nei, orgeno. LONDONO—LEIPZIG.

Ŝercenigmoj: 1. Ĉar ĝi estas bal-kono (balkono). 2. En tiu kaj la alia gravan lokon okupas barb-aro (barbaro). 3. Kiam ĝi estas bas-tono (bastono).

Ĉevaliro

Per ŝakluda ĉevaliro legu la sentencon entenitan:

	la	nan	ta	en
dro	ter'	ĝu	sk	Le
var'	ta	de	mi	sa
la	ŝer'	mal	vi	

13 794.

Ŝercenigmoj

4. Kial foiro iel similas fundamenton?

5. Kiu muzika instrumento estas samtempe dancvespero?

6. Per kiu oficiala dokumento oni povas ĉerpi ŝmiraĵon por ŝuoj? *1116.*

Humoro

Hebreo kun fileto preteriras la sinagogon. "Kio estas tio?" la fileto demandas. "Tio estas domo de dio!" La knabo ekmiras: "Domo de dio ... ĉu do dio loĝas en ĝi?" "Jes." "Sed en la lernejo oni instruas al ni, ke la bona dio loĝas en ĉielo?!" "Certe, tie li loĝas ankaŭ!" "Jen" konkludas la malgrandulo post mallonga medito, "en ĉielo li loĝas kaj malsupre li havas sian negocejon."

Elgerm. 3018.

*

Senelira situacio

— Nia administranto troviĝas en senelira situacio.

— Ĉu mankas mono en la kaso?

— Ho, tio estus ankoraŭ tolerebla. Oni lin malliberigis. *(13 354.)*

*

La geedzoj

Li: Mi estis freneza, kiam mi edziĝis kun vi!

Ŝi: Jes, vi estis freneza, sed mi kredis, ke vi fariĝus pli bona. *D. G. (15 030).*

[1] Erare ne presiĝis en apr. n-o la silabo VA, necesa por formi ĉi tiun vorton. La legantoj tamen certe divenis ĝian neceson kaj trovis la ĝustan solvon.

(Eldonkvanto 10 000 ekz.)

5-a Jaro. N-o 5 ★ MONATA ALDONO AL SENNACIULO ★ 15. V. 1930


La Lernanto

Redaktejo: 14, av. de Corbéra, Paris XII-e | Administrejo: Kolmstrato 1, Leipzig - O - 27

Gnaŭ-ventrego kaj Gnaŭ-ventreto

En iu vilaĝo estis du hundoj, unu el kiuj ne povis sin teni pro graseco, kaj la alia ne estis plu vivonta pro malgraseco. Oni nomis ilin Gnaŭ-ventrego kaj Gnaŭ-ventreto.

La unua ankoraŭ ne sentis iam malsaton; la dua ne sciis ankoraŭ tion, kio estas sati. Laŭŝajne la hundoj ne scias tiujn aferojn per la libroj.



Iam la dika hundo, dum li[1] manĝis ĉe la sojlo de sia mastro, admonadis la maldikan hundon. Li diris al li la plej malagrablajn insultaĵojn, kiujn oni povas diri al hundo. Li alnomis lin mondvaganto, senorelulo, fiulo, akarulo, filo de lupino, kaj mallaŭdis lin, ĉar li ne havis kolringon.

Li montris al la alia ostojn de bovido, de ŝafo, de porko; eĉ ostojn de kokino li montris al li dirante:

— Vi ne meritas ĝin, favulo!

* * *

La malgrasa hundo estis tiel maldika, ke li ne povis stari kaj mankis al li fortoj por respondi.

Vundita de ŝtonoj kaj bastonoj, kovrita de unu sola vundo, li englutis sian salivon pro malsato, kaj al li tremis la senharaj kruroj; kaj kiam li volis levi la kapon, ĝi falis tuj.

Liaj encerbaj okuloj nur petis al alia, ne predikojn, sed oston, osteton por ne malsatmorti; ili esprimis, ke lia vivo nur dependas de sensignifa osteto.

Sed la alia, trempita de enhejma moralo, daŭrigis la predikadon rigardante lin per sangaj okuloj. Estas nekalkulebla la kvanto da insultoj, kiujn povas diri ĉiamsata hundo al ĉiamfastanta hundo: nu, ilin ĉiujn bojis tiu al ĉi tiu. Li nur sciis tro manĝi, tro insulti, tro sin laŭdi kaj denove manĝadi.

Tamen estas kredinde, ke la dika hundo havis, kiel ĉiuj hundoj, bonan, ne tre malmolan koron rilate al la intencoj, sed nur li prokrastis la helpon por pli poste: tio estas — por neniam. Ĉar ĉiuj, kiuj prokrastas helpon, lasas ĝin por tempo kiam jam ne estas per kio helpi, aŭ kiun.

La fakto estas, ke la maldika hundo, kun pli kaj pli kaviĝintaj okuloj, ekmortis, nepre ekmortis, dum la alia daŭrigis montri al li ostojn kaj diri, dum li manĝis:

— Vi ilin ne meritas, favulo.

Tiumomente pasis gardisto kaj — —

Sed nun ni devas averti, ke, ĉar en la vilaĝo estis kelkaj rabiaj hundoj, al tiu gardisto estis ordonite ĵeti ve-

[1] Intence estas uzata *li*, anstataŭ "ĝi", kvankam temas pri besto, kies sekso ne estas klare difinita; ĉar en tiu parabolo, neeviteble, trudiĝas al nia cerbo la komparo kun homo. *Red.*

nenitan kolbason al ĉiuj hundoj troviĝantaj sur la strato sen buŝumo.

Do, pasis la gardisto kaj ĵetis kolbason, kaj — — —

Ĉiam la grasuloj, kvankam kutimitaj manĝi, agas kvazaŭ ili havus pli da malsato ol la malgrasuloj alkutimitaj ne manĝi; kaj en tiu okazo la regulo ankaŭ plenumiĝis.

Kiam la maldika hundo ekpensis leviĝi, jam la grasa estis englutinta la magistratan kolbason, flustrante:

— Tion vi ne meritas, favulo!

* * *

Kaj tie restis mortintaj ambaŭ, unu sur ventro kaj la alia sur dorso, pro ventra krevo, respektive pro ventra sekiĝo. Tie finmanĝis Gnaŭ-ventrego kaj finfastis Gnaŭ-ventreto.

Kiom ofte okazas tio, pli ol inter la hundoj, inter la homoj, malgraŭ la homa supereco!

El la "Paraboloj" de *Meabe*
tradukis V. Moreno (13 587).

1-a de majo 1930

Ne ploru, mia infano,
Pro la mizero premanta,
Vi petas "iom da pano"
Kun voĉo tremanta.

Ne plendu, mia karulo,
Rigardu ruĝan ekflamon
Sur horizonto, — makulo
Enmeze signas la dramon.

La ruĝa brilo potenca:
Jen nia fronto proleta;
Makulo nigra, sensenca,
Nur la burĝaro et-eta.

Foriĝos aĉa makulo,
Tre baldaŭ ruĝo ja venkos,
Neniam plu ĉi-rabulo
Proletojn fie sklavigos.

La reĝoj, pastroj kaj burĝoj,
Miksaĵo krime trompanta,
Pereos sange per skurĝoj
Proletaj, plu ne rabanta.

Kuraĝe levu la kapon,
Ne taŭgas ploroj kaj plendoj.
Neniam trovos kompaton
Prolet' en luksaj burĝtendoj.

J. P., horzono 1.

Nur tiam vi rajtas paroli pri sukceso, kiam el via kurso rezultas aliĝoj por SAT kaj abonoj por "S-ulo".

LINGVAJ NOTOJ

(Respondoj al demandoj)

2. Ĉu *dikajn gutojn* en la frazo *Pluvas dikajn gutojn* estas rekta komplemento? *Pluvi* estas nepersona verbo; en la frazo troviĝas neniu, kiu faras agon, nek troviĝas prepozicio.

Pluvas estas tiel nomata nepersona esprimo (pli ĝuste sensubjekta esprimo), ĉar la subjekto, la aganto (— ĉu persono, ĉu aĵo —) ne estas esprimita. Same: *Neĝas, hajlas, fulmas, tondras; frostas, degelas; estas varme* k. s.

Sed la subjekton oni povas alpensi kaj ankaŭ esprimi. Ekzemple: *La nubo pluvas, la ĉielo neĝas; la glacio degelas; la aero estas varma.* Ĉe Ŝekspir (Shakespeare) en "Reĝo Lear" (Lir) ni legas: ...*la pluvo, ĝi pluvas ĉiun tagon.*

Ankaŭ objekton (rektan komplementon) oni povas alpensi k esprimi ĉe tiaj verboj, kvankam ĝenerale oni rigardas ilin kiel netransitivajn; ekzemple: *Pluvas dikajn gutojn, neĝas grandajn flokojn;* metafore: *(la arboj) neĝas florojn* kaj en iu fabelo *pluvas* eĉ *talerojn* aŭ *dukatojn;* post la sukcesa ofensivo *pluvis ordenojn,* sed sur la kaptitajn malbonfarintojn *hajlis malbenojn kaj batojn.* Tiaj esprimoj egalmaniere troviĝas en naciaj lingvoj. Precipe en la familiara lingvo oni trovas kun rekta komplemento ŝercajn parolturnojn por tre forta pluvo: angle *it rains cats and dogs* = *pluvas katojn kaj hundojn;* germane *es regnet Bindfaden* = *pluvas fadenegojn;* france *il pleut des hellebardes* = *pluvas halebardojn.*

Tio estas nenio eksterordinara, ĉar ankaŭ al aliaj ĝenerale netransitivaj verboj oni povas doni objekton (rektan komplementon); ekzemple: *Li iris la malĝustan vojon; ŝi neniam vivis sian propran vivon; la aviadisto flugis grandan spiralon super la urbo.* Frundsberg diris al Luter (Luther) antaŭ ties iro al la Imperia Kongreso en Vorms (Worms): *Monaĥeto, monaĥeto! Vi iras malfacilan iron!*

La permeso, uzi en konvenaj kazoj la akuzativon anstataŭ prepozicion kun nominativo tre plivastigas tiajn eblojn; ekzemple: *ridi, moki iun* (= *pri iu*), *memori ion* (= *al, pri io*), *rajdi bonan ĉevalon* (= *sur, per bona ĉevalo*), *ĝoji la vivon* (= *pri, pro la vivo*). Ankaŭ la frazojn kia *pluvas dikajn gutojn* k. s. oni povas klarigi al si kiel anstataŭajon de prepoziciaj esprimoj kia *pluvas per dikaj gutoj.* Simile ni trovas ekzemple en la latina lingvo *sanguine pluit* = *pluvas per sango* kaj *sanguinem pluit* = *pluvas sangon;* la franco diras kun prepozicio *il neige à gros flocons* = *neĝas per grandaj flokoj,* dum la germano preferas en tiaj esprimoj ĉiam la akuzativon.

En ĉiuj tiaj frazoj oni povas rigardi la vortojn en akuzativo kiel rektan komplementon de la verbo (predikato).

En la frazoj, en kiuj rekta komplemento sekvas la vortojn *pluvas, hajlas, neĝas,* ĉi tiuj havas en si la signifon de *amase ellasi, lasi*

malsupreniĝi, faligi (*gutojn, flokojn, dukatojn, batojn*). Sed en naciaj lingvoj, ekzemple en la supra Ŝekspir-citajo, ni trovas tiujn vortojn ankaŭ kun nominativaj subjektoj, kiuj ne permesas la nomitan signifon, sed postulas subkompreni la ideon de *mem amase malsupreniĝi, fali*. Ekzemple: latina *res pluit* = *io*(*m*) *pluvas;* germana *Schutt und Staub regnete auf ihn* (*herab*) = *rubo kaj polvo pluvis sur lin; Hunderte von Steinen hagelten auf sie nieder* = *centoj da ŝtonoj hajlis sur ilin*. Ĉar miskomprenoj el tio ne estiĝas, oni povas atribui al *pluvi, neĝi* kaj *hajli* ambaŭ montritajn signifojn.

Dum en la frazo *Ne pluvis varmego: estis ... flamoj kiuj ... malsupreniris* ... (Paĝoj el la Flandra Literaturo 127/29) ni trovas klare la duan signifon, la zamenhofa traduko *Mi pluvigos tre grandan hajlon* (Eliro IX, 18) ebligas du analizojn: 1. *Mi igos, ke pluvas tre grandan hajlon* kaj 2. *Mi igos, ke pluvas tre granda hajlo*. La dua, kiu entenas ankaŭ la duan signifon de *pluvi*, ŝajnas al mi la pli natura.

D-o W. Lippmann
Direktoro de la Sekcio: Gramatiko ĉe la Esperantista Akademio.

La zorgo pri la forkurinto

(Laŭ Bobinska: P i o n i r o j)

La pioniroj konis tre bone sian lagon. La malhelaj nuboj venantaj de oriento antaŭdiris nenion bonan. Kaj la hirundoj flugis tre malalte super la akvo.

— Kion fari? maltrankviliĝis[1] Mitka, — tiu ĉi frenezulino certe ne havos la forton por remi ĝis la urbo[2]. Se almenaŭ ŝi havus la ideon pasigi la nokton sur la insulo ...

— Vi pensas! ŝi volas certe iri ĝis la celo, atingi la urbon.

— Oni devas helpi al ŝi, proponis Katka.

— Mi scias bone, ke oni devas; sed kiel? Mi ne povas lasi vin foriri solaj[3]; kaj mi mem ne povas forlasi la tendaron por la nokto antaŭ la fulmotondro.

— Ni foriros solaj, deklaris firme Vanka.

— Mi ne lasas vin foriri! Kaj krome, en tiu ĉi malgranda barketo!

— Kion do fari tiam[4]?

Mitka estis kvazaŭ batita kontraŭ la kapon[5].

La knaboj penis lin konvinki.

— Sed nenio okazos al ni, pensu! insistis Katka. — Ni foriros triope, mi, Juk kaj Vanka. Ni naĝas ĉiuj kiel fiŝoj.

— Estas eĉ pli bone ol sur la malgranda barketo, oni alvenos pli rapide.

— Jes, la unua granda ondo ĝin renversos.

— Ne diru tion!

— Pensu sole[6], ke Amiutka dronos! preskaŭ ploris Tamarka.

— Vidu, vidu, ŝipo! ekkriis subite Juk.

— Kie? Kiu[7] ŝipo?

Jen ĝi venas al ni, oni vidas la fumon!

Ĉiuj vidis distinge la fumon kaj eĉ la kamentubon de la ŝipo.

— De kie ĝi venas? Tamen ne estas dimanĉo hodiaŭ.

— Estas sendube inĝenier-ŝipo, diris Mitka post inspekto.

— Ĝi venas rekte al ni.

— Eble ĝi haltos?

— Sendube al ili estas sciigite[8], ke la fulmotondro rompis la digon, kaj ili venas por vidi surloke.

— Ili reiros eble poste al la urbo?

— Oni povus rekapti Amiutka'n!

— Kaj se ĝi ne haltas?

---

[1] Aŭ: ekscitiĝis, zorge demandis sin M. [2] Aŭ: ĝisremi la urbo*n*. [3] T. e. = Mi ne povas permesi, ke vi foriru solaj (adjektiva formo *-aj*, ĉar ĝi rilatas al *vi*, ne al la verbo de l' frazo). [4] Aŭ: sekve. [5] Ankaŭ: M. ne sciis konsilon nek eliron. [6] Ankaŭ: nur; oni povas aldoni kompletige: pri tio (ke...). [7] Ne: *kia* ŝipo? ĉar la demando pri la *kvalito* (de la ŝipo) povas sekvi nur post certiĝo pri la ekzisto de iu ŝipo mem. [8] Aŭ: sendube oni sciigis al ili; ankaŭ: ...ili estas atentigitaj, ke...

ANEKDOTOJ

Virindisputoj

Eksterordinara okazo estiĝis en la funebre lumigita kapelo, kie ripozis la kadavro de l' sinjoro Aleksandro Garce de la Pena, riĉa meksikia farmisto, kiu estis transdoninta sian animon al dio meze de la ploradoj de siaj kuncivitanoj.

Dum oni recitis la mortpreĝojn kaj la vidvino ploris apud la malferma ĉerko, virino, Anno Mario Rozales, kiu pretendis esti la unua edzino de l' mortinto, eniris kun bruego kaj provis forlogi sian konkurantinon.

La du "vidvinoj" interŝanĝis akrajn vortojn, kaj, malgraŭ la klopodoj de l' ĉeestantoj, por ilin trankviligi, ekinterbatalis.

Sed, subite, s-o Garca de la Pena, kiu, fakte, suferis nur je letargia dormo, ekvekiĝis, malfermis la okulojn, kaj, eksidiĝante en sia ĉerko, demandis pri la kaŭzo de tiu tuta bruego.

Teruregitaj pro tiu ĉi neatendita interveno, la du virinoj forkuris laŭtigante panikajn kriojn. La novaĵo pri la "reviviĝo" disvastiĝis rapide tra la urbo, spireganta amaso sieĝis la domon, postulante vidi la "mortinton". Centoj da policanoj k fajrobrigadistoj alkuris por ĉesigi la tumulton.

Kio koncernas la reviviĝinton, li, demandite pri la misteraj cirkonstancoj de sia vekiĝo, kontentiĝis respondi:

— Ĉiuj, kiuj ĉeestis la scenon, komprenos facile, ke disputo inter du ĵaluzaj virinoj sufiĉas por veki mortinton! *D.*

La ombro de l' azeno

Iun tagon, kiam Demosteno, de la alto de l' tribuno, provis altiri la atenton de l' atena popolo al gravaj demandoj, li ne sukcesis aŭskultigi sin. Li havis tiam la ideon komenci la sekvantan reciton:

Junulo estis luinta azenon por iri de Ateno al Megaro. Estis somera tago; ĉirkaŭ tag-



Redakcia adreso: A. SCHWARZ, Lerchenstrasse 14, Neckarsulm (Germ.)

IO EL LA DORTMUNDA JUNUL-TRIBUNALO

Eble ne estas la multnombraj justeceraroj k tiuj sur ili bazitaj erar-juĝoj, kiuj estigis la profundan abismon inter juĝado k popolo. Tiel longe kiel la homo vivas, li eraras, sed daŭre li ankaŭ serĉas kiel eble plej bonajn garantiojn por eviti erarojn. Ĉar nun ĉe la pun-juĝado la homa honoro estas en danĝero, plej ofte ankaŭ la ekzisto k eĉ la vivo, estus devo, ĝuste pro tio, certigi al si la plej vastan ŝirmon. Estas procedo inter kulturhomo k lia juĝado, kiu devas trapasi la fazojn de la timo, miskompreno, arogo k fremdigo. Senponta abismo estiĝas tie, kie la formala juĝado ekkaptas per sia danĝera, kaŝe spinita araneaĵo tiujn, kiuj pro iu ajn malfeliĉo hazarde venis en ĝian proksimon. Ĉi tie oni kruele sentas la "justan juĝadon" laŭdire faratan je la nomo de l' popolo, kiel fremdan al popolo maljuston, al kiu oni nur povas kontraŭmeti necedeman malaprobon. Kaj tia juĝado domaĝas multe, ĝi estas sufiĉe forta por detrui la konfidon k solidaron ĉe la koncerna persono.

Sed mi ne volas pritrakti ĝenerale la aferon, sed speciale skribi pri junul-juĝejo. Al tiaj juĝkunsidoj ne estas ĉi tie allasataj publikaj aŭskultantoj. Nur rajtas aŭskulti reprezentantoj de katolika, protestanta k urba junulzorgado, depost kelka tempo ankaŭ tiaj de liberpensulaj organizoj.

Je la naŭa matene ni eniris la salonon. Du skabenoj jam ĉeestis. Ankaŭ la juĝisto alvenas sammomente. Ili intersalutis per manpremo. La juĝisto surmetis nigran, mezepokan robon, kun larĝaj manikoj. La strangan nigran ĉapon li ne surmetis, ĝi kuŝis antaŭ li, sur la tablo. Li sidiĝis meze ĉe la tablo k ambaŭflanke la skabenoj. Ili ĵuris je la nomo de dio, komence de la kunsido. Krom ili sidis ĉe la sama tablo la prokuroro k protokolisto de la juĝejo. Oni nun venigis la akuzanton k akuziton k pritraktis jenon:

Junulo el metilernejo estis punata de sia instruisto arest-resti en la lernejo. Por tio la punatoj devas veni dimanĉon posttagmeze en la lernejon. La instruo tie jam komenciĝis. Unu lernanto alvenis tro malfrue, portante la ĉapon ankoraŭ sur la kapo. La instruisto demandis lin, kial li malfruiĝis. La respondo estis: "La tagmanĝo ne estis preparita pli frue." — "Kial ci ne forprenis la ĉapon de via kapo, ĉu ci ne scias, ke tion ci devas fari tuj en la koridoro?". La lernanto respondis: "Tio ne gravas, tio estas mia afero." Nun la instruisto rigardante al la aliaj lernantoj demandis: "Ĉu vi jam foje vidis tian idioton?" Ĉiuj ridis. Sed la lernanto pro tio ekscitiĝis k respondis enpoŝigante la manojn: "Jes, mi estas sama idioto kiel vi." La instruisto ekscitita, pensante, ke la junulo elpoŝigas trančilon, volis bati lin; sed apenaŭ li levis la manon, li jam mem estis ricevanta tian vangofrapegon de la junulo, ke la signoj estis videblaj dum kelkaj tagoj. Poste la junulo ploris, la instruisto iris al li k ambaŭ repaciĝis.

Kompreneble la instruisto iris al la patro por plendi. Ankaŭ tie, forlasante la patron, li promesis nenion plu entrepreni en la afero. Tion li pensis, sed ne liaj kolegoj k la direktoro. Alian matenon ili aŭdis pri tio, vidis la ŝvelintan vangon k diris, ke tion li ne devus toleri. La direktoro alvenigis lin, por priparoli ĉion. Li konstatis, ke tia faro kontraŭas la disciplinon, ke oni nepre devas akuzi la koncernan junulon, ke estas sentaŭgulo, kiu daŭre pekas ktp. Antaŭ la juĝisto la instruisto akcentis, ke li antaŭ tiu tago ne konis la lernanton k estis devigita de la direktoro akuzi la lernanton.

Sed tio verŝajne ne plaĉis al la prokuroro, kiu diris: "Ni devas gardi k ŝirmi lernejon k aŭtoritaton. Pli ol iam ni bezonas la lernejon disciplino devas esti; kio okazus, se ni ne punus lin?" Rigardante la junulon li diris: "Unufoje vi jam estis punita" (ĉar li veturis per aŭtomobilo de l' patro ne havante ekzamen-ateston, laŭ diro de sia patro). Ĉi lasta nun rakontis, ke la propra instruisto ne povas harmonii kun la filo, ke li jam kelkfoje petis sendi lian filon al alia instruisto, sed ke tion oni ne permesas. Li nun postulas liberigi lin de la lernejo, por ke ĉio finiĝu. Ili ne fintraktis la aferon, ĉar la juĝisto ne certe sciis, ĉu estas permesate bati aŭ ne, en metilernejoj.

La juĝisto estis konvinkita, ke la lernanto malĝuste agis, sed ne esploris, ĉu necesas aŭ justas en lernejo diri al lernanto "ci estas idioto". Mi ne kredas, ke tiaj vortoj helpas bone eduki junulon. Krom tio, ĉiu eble mem spertis, ke kelkfoje instruisto ankaŭ diras ion kontraŭ la disciplino aŭ agas kontraŭ ĝi, tamen nepunate, ĉar plenaĝulo li estas k pensas rajti fari ĉion. Sed junulo neniam peku kontraŭ disciplino! *H. F. (13 563), Germanio.*

Alvoko al junpioniroj de l'tuta mondo!

Karaj Gek-doj! Ĉiulande kreskas nia juna armeo, k ĉie ni estas egalaj en niaj ideoj k sentoj. Tio estas nia forto. Ni konas nian komunan malamikon, k ĉiam estas pretaj kontraŭbatali ĝin, en kia ajn lando. La sola baro inter ni estas la lingva malsamo, k ĉi tiun baron ni facile forigos per *esperanto.* Per ĝia helpo ni povos starigi korespondadon de ĉiulandaj pioniroj, ni havos komunan por tutmondo belan pioniran literaturon, k per ĝi ni parolados dum niaj tutmondaj konferencoj.

K-doj! La Unua Tutmonda Infan-Konferenco devas starigi devizon: "Esperanto estu la dua lingvo de ĉiu pioniro!" Elektu esp. delegitojn! La estonto apartenas al ni! Neniigu la lingvobarojn k unuigu la prol. infanarojn de l' tuta mondo en frata firma rondo.

Pionira komuno "Stalinka", Kuŝĉova Infanklubo, Zinovjevsk, Ukrainio.

Ni petas ĉiujn laboristojn diskonigi al infanoj nian alvokon.

Nia politik-sociologia laborkomuno

La taskaro de l' proletara junularmovado plenumiĝas ne nur per dancado, kantado, ludado aŭ migrado. Certe por grandega parto de l' gemembraro tio ja estas la ĉefaĵo, k ni tute ne povas rezigni je ĝi, ĉar ne ĉiuj homoj povas havi saman koncepton pri io. Sed ĉiam estos grupo el homoj, al kiu ne sufiĉas tia koncepto pri prol. junularmovado! Tiu parto opinias, ke la plifortiĝon de l' korpo devas paraleli la klerigo de l' spirito, ĉar aliel la prol. jun. nur estus organizo, en kiu oni atentas korpkulturon; sed ĝi ja ankaŭ grandskale volas flegi spiritkulturon. "En sana korpo devas esti sana spirito", tiu ĉi malnova greka proverbo ricevas nuntempe denove plenan signifon k devus esti la devizo de ĉiuj junaj, antaŭenemaj socialistoj.

Ankaŭ en nia loka junularo grupiĝis aro el homoj, kiuj kun tuta koro sentis, ke mankas al ni la spirita interligo. En la cerboj de l' unuopaj homoj estiĝis demandoj k problemoj, kiujn ili, sen kompetenta gvidado, ne ĝuste povis solvi. En ĉiutagaj gazetoj k monatrevuoj oni tre ofte legas ion, kion oni en la unua momento ne ĝuste k ne ĝisfunde komprenas; povas ankaŭ okazi, ke oni kredas esti kompreninta ĝin, sed en vero la senco estas tute

LA LERNANTO 3

TRA ESPERANTIO

LA 8-a JARKONFERENCO DE ANGLALINGVA LEA

Okazis je 20. aprilo 1930 en la Emili-Devison Klubejo, 144, High Holborn, Londono, je la 10.30 horo k daŭris ĝis la 20-a. Ĉeestis delegitoj el Bournemouth, Derby, Hyde, Leeds, Liverpool, London, Stockport, Swindon k Willesden. Ĉeesto de Londonanoj ne estis sufiĉe granda, ne sufiĉe montris la viglon de l' loka esp. movado. La jarraporto montris kreskon de l' membraro ĝis 210 individuoj k 150 en filiiĝintaj organizoj — Manĉestra Lab. Esp. Klubo, Orientlondona Instruista Laborligo k Ŝefilda Kooperativa Gildo. Grupoj en Birmingham, Enfield k Grays disfalis pro manko de lokaj gvidantoj, sed revivigaj klopodoj daŭras; cetere nova Asocia faka labormetodo plifortigos nin dum la venonta jaro. La jarbilanco montris elspezon de 60 funtoj sterlingaj.

Pro tropezo de l' sekretaria laboro necesiĝis revizii la asociajn regulojn por dispartigi la laboron en 10 fakojn: sekretaria, financa, organiza, SAT-peranta, redaktora, gazeteldona, librovenda, gazetserva, gazetkursa k eksterlanda. Esp. rubrikoj aperas en *Daily Worker* k *Dundee Free Press* (semajne), *Labour Woman* (virina) k *Worker's Monthly* (monate). *Daily Herald* ne plu presigas esp. notojn, k laborpartiaj registaranoj patronas la neŭtralan mondkongreson.

La sekretario de la 10-a SAT-Kongreso, K-do Sulski, raportis, ke 192 anoj aliĝis. Li akcentis la bezonon je loĝejoj por kongresaliĝintoj el eksterlando. Ricevitaj leteroj montras, ke multaj laboristoj ne scias la diferencon inter la Londona k Oksforda kongresoj!

La Konferenco decidis, ĉar la kosto de ĉiumonata *Brita Laboristo* estis tro granda, ĝin aperigi nur kvaronjare. La metodoj sukcesintaj en Sovetio, memkritikado k socialisma konkurado, estos uzataj en la presorgano por pligrandigi varbadon k vendadon de la *Brita Laboristo*. La sekretaria adreso de BLEA estas 29, Staines Road, *Ilford*, Essex. *2052.*

1-a Laborista Esperanto-Konferenco en Svisio

La 20-an de aprilo okazis en la urbo Zürich la 1-a Konferenco de lab. esp.-istoj el tuta Svisio. Ĉeestis 35 Gek-doj, plejparte SAT-anoj. La situacio de nia movado diktis al ni la traktaĵojn, el kiuj la plej grava estis: La pligrandigo k plivigligo de la lab. esp. movado en Svisio. La konferenco ekkonis la gravon de plej intensa kunlaborado inter la diversaj grupoj. La interligo por komuna laboro ĉe ni ne estas facila, ĉar niaj anoj estas organizitaj en du asocioj, unu parto apartenas al FEO (franclingva) k la alia parto al LEA (por germanl. regionoj). Tamen unuanime estis malakceptata la propono pri fondo de "Svisa lab. esp. federacio", ĉar ni ja ne estas naciaj esp-istoj, sed sennaciuloj, kiuj kunvenas en laŭlingvaj asocioj nur por pli bone propagandi nian lingvon. La konferenco ne nur esploris la eblon por kunlaborado, sed ĝi mem jam estis la unua paŝo al tio. La intereso k la volo por severa laboro vivas inter la lab. esp-istoj en Svisio, sed la malfaciloj estas grandaj.

La iniciato por la konferenco venis de izolulo, k la Zürich-aj K-doj akceptis ĝin kun duboj, sed ni estis sufiĉe konsternitaj, kiam alvenis la respondo de niaj Gek-doj el Ĝenevo. Ili loĝas en la plej malproksima angulo de la lando, ili havis la plej grandajn elspezojn, k tamen ili vizitis plej multnombre la konferencon. Tiu ĉi oferemo montras la intereson k viglon de ilia grupo. Entute la konferenco interligis div.-lingvajn gelaboristojn, kiuj antaŭ mallonga tempo estis fremdaj unuj al aliaj k kuraĝigis ilin por fervora laboro.

LEA-grupo Zürich.

ANKORAŬ PRI KORESPONDADO

Min mirigas neserioza rilato de multaj niaj K-doj al korespondado. Kiam mi antaŭ tri jaroj komencis korespondi kun eksterlandaj K-doj, mi devis sendi almenaŭ 10 leterojn por ricevi unu respondon. Tiutempe tamen mi jam estis sufiĉe sperta esp-isto, skribis interesajn k legeblajn leterojn, promesis sendi gazetojn ktp. Kun granda peno mi sukcesis varbi 3—4 korespondantojn. Unufoje mi ekkoleris pro silento de K-doj, al kiuj mi sendis leterojn, k sendante PI al iu angla K-do, mi subskribis ne "K-do", sed "K-dino". Kaj kio do? Post 13 tagoj mi akurate ricevas afablan respondon kun propono daŭrigi la korespondadon.

Aŭtune en 1929 en nia urbo malfermiĝis esp. kursoj inter junkomunistoj. Post 3 monatoj de lernado, la gelernantoj ekvolis korespondi k kiaj rezultoj? Lernantinoj ricevas respondojn k lernantoj nur atendas. Mi iomete ne komprenas. Ĉu nia prol. koresp-ado ekzistas nur inter malsamaj seksoj? Ni korespondas antaŭ ĉio por internacia edukado, por reciproka pens- k impres-interŝanĝo! Amatoroj de ŝerca k facila koresp-ado iru al neŭtralaj gazetoj k ne malhelpu nin! *10 041, Sovetio.*

Klarigo de mia opinio pri "S-ulo"

Mi vidas, ke mia opinio pri nia gazeto estas iom miskomprenita. Mi tute ne kontraŭstaras nian 12-paĝan *interesan* gazeton — mi ĝian amplekson kontraŭstaras, se ĝi estas neinteresa. Ĝi povas esti tiom ampleksa k ilustrita, kiom permesas disponeblaj rimedoj, tamen sen plialtigo de abonpago. Ne necesas presigi en "S-ulo" detalajn informojn pri organizoj havantaj etan anaron, same ne bezonaj estas biografioj pri gvidantoj de pasintjarcentaj socialistaj sektoj. El kelkaj industrilokoj oni ofte fabrikas rakontojn pri interpuŝiĝoj de laboristoj k polico, kiuj tute similas unu la alian k parte estas legitaj jam en tagĵurnaloj. Pasintsomere la enhavo de "S-ulo" ŝajnis tre pala, enuiga pro trolongo de artikoloj kiel resumoj pri "Standards". Ankaŭ mi tute ne atentas sekajn statistikojn. Depost lastaj pasintjaraj monatoj mi preskaŭ ĉiujn legaĵojn en "S-ulo" trovas interesaj, instruaj. Sed mi opinias, ke ankaŭ aliaj legaĵoj estas necesaj por mi, kvankam ili ne superas "S-ulo"n ... Vesperajn kursojn mi ne povas partopreni, ĉar mi ne ĝuas normalan tagan labortempon, k liberalia, mala. La aranĝo de io, kio forigas ĉi tiun malcertan, malagrablan por la tuta movado situacion, ĉiam pli k pli urĝiĝis k la junaj homoj vere sopiris je ampleksa, sistema klerigo. Tiaj estis la kaŭzoj, ke ni antaŭ nelonge malfermis politik-sociologian laborkomunon, kies gvidadon volonte transprenis la ĵus el Gisen (Giessen) veninta sekretario de l' metallaborista sindikato, K-do Dolle. Li bonege kapablas, en stilo de l' laborkomuna instrumetodo, per facilaj, elokventaj paroloj komprenebligi al ni la sociologian k politikan terminaron. Ni lernis tre multe en ĉi tiuj vesperoj, ĉefe pri la estiĝo de l' homa socio, k mi volas provi, en sekvantaj linioj doni ekstrakton de l' akirita scio. (Finota.)

Fr. Riedel (14 981), Giessen.

Aĉetu k aĉetigu
NI LEGU!
de Brunulo
la ŝatata Legolibro de l' SAT-anoj, kies 3-a eldono korektita, reviziita, ilustrita, bele kartonita, devus troviĝi en la manoj de ĉiu perfektiĝanta esperantisto.
112 paĝoj 12×17 cm Pr. 1 mk.g.
Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27 (Germ.)

ajn vesperojn mi profitas por viziti koncertojn, teatrojn, operon k nepre ĉiun unuan balet-prezentadon — eble mi tial havas malgrandan klaskonscion (laŭ K-do Broglin en n-o 288): obeemaj partianoj ja vizitas prezentaĵojn nur rekomenditajn de propraj presorganoj . . . *K. Kronis (11 321).*

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

AŬSTRIO. La perant-kunsido de fervoj. fakgrupoj de ALLE okazis je 19. aprilo en *Graz,* la tagon antaŭ la Liga plenkunveno; ĝi maturigis fundan organizadon perantan en la provinco, kie preskaŭ en ĉiu loko ekzistas peranto, kies tasko estas sciigi la estraron fakgrupan, kiu troviĝas en Vieno, pri aktualaj esp. aferoj sialokaj. Interkonsente ĉiu peranto ricevas skriban raporton pri ĉiumonata estrarkunsido en Vieno. La perant-kunsido pritraktis estintan k estontan laborprogramon. La aŭstriaj ferv. esp-istoj deziras ĉijare dum la ferioj (15. 7./1. 9.) interŝanĝi siajn infanojn kun tiuj de eksterl. ferv. esp-istoj. Por 1931 la fakgrupo decidis entrepreni studvojaĝon al Nederlando. Al ITF la fakgrupo esprimis bondezirojn koncerne esp.-lingvajn ĝiajn porgaz. raportojn k decidis rekomendi al la membraro abonon. Certe venos la momento de konscio pri neceso de ferv. sekcio inter SAT-anoj (9437). — *GERMANIO. Crimmitschau.* Post parolado de K-do Scheibler el Wurgwitz en kunveno de libera lerneja klubo pri "Ĉu ĉiu infano povas k devas lerni esp-on?" oni akceptis rezolucion al la urbestraro pri deviga lernej-instruo. La rezol. trovis subtenon de l' sindikata, kultura k sportkarteloj (3860). — *HISPANIO. Madrid.* La lab. esp. grupo decidis en ĝen. kunveno festi unuan datrevenon de sia fondiĝo. En la unua jaro ĝi kreis 6 kursojn, seninterrompe funkciantajn. Kiel lernolibron oni uzas senescepte "Petro"-n k atingas per ĝi bonajn rezultojn jam post 4-monata studado. Supera kurso por instruantoj en preparo. La grupo havas 94 membrojn. Je 13. aprilo okazis en popoldoma kafejo festkunveno tre bone vizitita de esp-istoj k simpatiantoj. Ano de alia Madrida grupo "Antaŭen" proponis la kreon de hispanlingva LEA. Pluraj aliĝoj al la grupo plenumiĝis en tiu vespero. Poste ankaŭ parolis la direktoro de l' ĵurnalo "El Socialista", kiu tamen anstataŭ propagandi por esp-o, propagandis por socialismo k tiel malpaciencigis la aŭdantaron. Ankaŭ malplaĉis al kelkaj, ke li nomis la grupon "socialista", anstataŭ "laborista" (*E. Gariz, 15 430*). — *SOVETIO. Brjansk.* K-do Lingel faris dum marto 18 paroladojn en div. fabrikoj, institucioj k lernejoj. Rezulte tri kursoj: en domo de Sovetoj (26 p.), domo de Bankoj (29 p.), Poŝtoficejo (28 p.). — 5087. — *USONO.* Oni notu, ke krom la morala sukceso de la festeno de l' Novjorka SAT-Rondo (en marto) ankaŭ la financa profito estis kontentiga. Neta profito sumis 45 dolarojn, kies duono estis donacita al IRH. (29).

Imitinda laboro en Göteborg

En Göteborg (Svedio) la plej granda librovendejo "Gumperts" dediĉis tutan montrofenestron al esp. literaturo. La vendejo estas en stratangulo, k oni montris la elmetaĵon dum unu semajno ĉe unu, dum la alia ĉe la dua strato. Inter la eldonaĵoj oni rimarkis Zamenhof-verkojn k ankaŭ kelkajn SAT-eldonojn, ekz. *Kandid.* Per instigo k libroaĉetado oni atingis, ke la samo estos ripetata plurfoje. Tio okazis unuafoje en nia urbo.
A. F. Larsson (12 286).

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Internaciaj Konvencioj pri fervojaj person-, pakaĵ- k fretaĵ-trafikoj. Trad. J. Rebiĉek. Eld. Moraviaj Esperantopioniroj, *Olomouc,* Ĉeĥoslovakio (Riegrova 17). 241 pĝ. *hektografitaj.* Form. 20×16 cm. Prezo: kr. ĉ. 7.50 por malgranda, kr. ĉ. 27.50 por granda eldono.

Laŭ la intenco de l' eldonintoj la libro en tiu ĉi formo devas servi nur por doni eblon kompili komercfakajn fervojajn esprimojn. La tradukinto deziras, ke la legantoj komparu la tradukon kun nacilingvaj tekstoj de l' sama eldono k rimarkigu evtl. korektindaĵojn al ili.

Reisen und Studienfahrten (Vojaĝoj k Stud-ekskursoj por laboristoj k oficistoj). 1930. Eld. Reichsausschuss für sozialistische Bildungsarbeit (Regna komitato por socialista kleriglaboro), *Berlin SW 68,* Lindenstr. 3. 40 pĝ. Form. 15×23 cm. Bele ilustrita broŝuro kun kolora kovrilo. Kun programo por nunjaraj studvojaĝoj. Prezo: 0.35 mk. g. En sama eldonejo: "*Reiseblätter*" (Vojaĝgazeto); aperas ¼-jare, ilustrita. Celo: propagandi por la ideo de laboristaj vojaĝoj. Ambaŭ eldonaĵoj germanlingvaj.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

L'Humanité, Metz, 13/14. 4., La skandalo de l' fremda legio, *De Tribune,* Amsterd., 14. 4., Al nova vivmaniero (229), *De Wapens Neder,* apr., eksterord. tago (263), *Salzburger Wacht,* 22. 3., 1. 4., 8. 4., 9. 4. (laŭ div. notoj en "S-ulo").

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Salzburger Wacht, 3. 4., 14. 4. (100 lin.), *Neukirchener Bezirksbote,* 21. 2., *Badener Wacht,* 7. 3., 14. 3. *Het Volk,* Amsterdam, 7. 4., *Tribune,* Amsterdam, 7. 4. (pri nederl. kongr. lab. esp.), *Signalen,* Stokholm, 17. 4., 24. 4., *Daily Worker,* London, 22. 4. (rubr.), *L'Effort,* Lyon, 12. 4., 19. 4., 26. 4. (pri Senn. Ped. Rev.), *Lyon Républicain,* 17. 4., *Le Semeur,* Falaise, 24. 4., *Le Cri du Peuple,* St. Etienne, 19. 4., *Vanguarda Operaria,* Porto, 20. 4. (art. de 15 367), *Ruhr-Echo,* Essen, 17. 4., 19/20. 4., 23. 4. (okaze de LEA-kongr.).

Peresper. materialon enpresis:

Le Bellevillois, Paris, aprilo.

NIA POŜTO

O. Walter k 14 291. — Resp. al viaj demandoj pri la projekto sekvos en "S-ulo".

14 441. — Via artikolo aperos baldaŭ.

3201. — Ni uzos en okazo de bezono.

5323. — Via atentigo ne povas esti enmetata senpage. *Red.*

Baranov (Rostov). — Escepte ni akceptis ĉi anoncon: "Tri K-dinoj". Teksto estas tro multa por 0,60 rubl. Mankas ankoraŭ 1,05 rubl. *Adm.*

KORESPONDADO

AŬSTRIO

K-do William Wiese, Steinabrücklergasse 10/II./26, *Wiener-Neustadt,* kĉl, PI, PM.

BULGARIO

K-do Kosta Tringov (26 j., fraŭlo), str. Prolet 14, *Plovdiv,* kĉl, resp. gar.

FRANCIO

K-do J. Poiraudeau (19 j.), E. N. Instituteurs, *Roche-s.-Yon,* Vendée, kun socialistaj K-dinoj ĉl.

GERMANIO

K-do Artur Breuer, Oberstr. 29, *Radeberg/Sa.,* PM, kĉl. Resp. garant.

K-do Alfred Klippel, *Olbersdorf b. Zittau/Sa.,* PM, PI, kĉl. Resp. gar.

— 9 Gek-doj koresp. kĉl, L, PI, gaz. — Adr.: K-dino Erna Köhler, Böhmische Str. 44, *Sebnitz/Sa.*

HUNGARIO

K-do Andreo Csikesz, Mesterstr. 55—57, *Budapest, IX,* kun seriozaj K-doj el Francio k Belgio.

— Grupo de laboristaj esp-istoj koresp. kĉl, pri ĉ. temoj. Skribu al: K-dino Aŭrelio Obornj, Gergely str. 68, *Budapest.*

SOVETIO

— La gelernantaro de la 7-a lernejo en *Kremenĉug* (Ukrainio), strato de Gogol koresp. kun lernantoj el ĉl., pri ĉ. temoj.

— Viglan koresp-adon garantias 150 gestudentoj pri ĉ. temoj, kĉl. Adr.: Ukrainio, *Kremenĉug,* Pedagogia Teknikumo.

— Scienca Kabineto de Geologio k Mineralogio interŝ. sperton k ekspozaĵojn. Adr.: Ukrainio, *Kremenĉug,* Pedagogia Teknikumo.

Korekto. Bonvolu legi en n-o 291, p. 350, 1-a kolono, linio 29 de malsupre: "neplenaĝo" (anst. malplimulto).

SOVETIO

— Barnaŭla agrarteknikumo koresp. kĉl, L, PK, gaz., ĵurn., precipe kun kamparanoj, agrarlernejoj, agrikulturistoj, priagrarsistemoj, kamparana k junulara vivo. Adr.: *Barnaŭl*, "Selĥozteĥnikum" Esperanto-rondeto.

K-do P. Petrov (junulo, konstrulaboristo), Ĉernjaevskaja ul. 17, kv. 2, *Rostov/Don*, kĉl, pri ĉ. temoj, PI, il. gaz.

K-dino S. K. Amŝiĉkina (instruistino), Turgenevskaja 92, kv. 1, *Rostov-Don*, kĉl, pri lerneja vivo k. a. temoj.

— Scienca Kabineto de Terkulturo k Kamparana Mastrumado interŝ. sperton k ekspozaĵojn kĉl. Adr.: Ukrainio, *Kremenĉug*, Pedagogia Teknikumo.

— Sportula rondeto koresp. kĉl, pri div. speçoj de sporto k kondiĉoj, metodoj de sporta movado. Adr.: *Rostov-Don*, ul. Engelsa 77, Dvorec Truda, Sojuz Piŝĉevikov, Kruĵok Fizkultur.

K-do A. S. Naiŝev, Vostornaja 53/54, kv. 4, *Rostov/Don*, kĉl, pri socia vivo, vivkondiĉoj, j. movado k. a. temoj. Interŝ. il. gaz., afiŝojn ktp.

K-dino R. Volovik, Sennaja 217, kv. 9, *Rostov/Don*, kĉl, pri ĉ. temoj k bibliotekaj aferoj, il. gaz.

K-dino M. Bejzerman (trikistino), Proletarska str. 89/16, *Kiev*, kĉl, pri ĉ. temoj.

— Tri K-dinoj — kĉl, pri liberpens., virina movadoj, nova literat., teatro k. a. t., PI, il. gaz. Adr.: M. F. Deulina, Nov. Poselen., Lermontovsk. 9, kv. 2, — R. F. Razutova, ul. Engelsa 186, dom SKOPS-a 5-i etaĵ. — M. G. Gonĉarova, Staro-Poŝtov 67, kv. 2. Ĉiuj en *Rostov/Don*.

Granda dusemajna gazeto

"Sur Kultura Fronto"



priservanta kleriglaborantojn de lernejoj, fabrikoj k vilaĝoj en Malsupra Apudvolgio, bezonas skizojn, artikolojn, fotojn pri div. demandoj de pedagogia k kulturkleriga laboro inter infanoj k maturuloj. Ĝi mem pretas liveri similan materialon, kondiĉe ke ĝi estu uzota en revolucia gazetaro. Por ĉiu prespaĝo de aperigotaj koresp-aĵoj oni pagas 6 rubl.; fotoj estas aparte pag. Adr.: USSR., Saratov, ul. Respubliki, 29, ĵurn. "Na Kultfronto".

Nekrologo

La 21-an de aprilo 1930 mortis subite, 30-jara, nia fervora K-do

ERICH MARSCHNER

SAT-ano 10 848

Ni perdis kun li karan kamaradon k fervoran esperantiston, al kiu ni gardos ĉiam bonan memoron.

Laborista Esperanto-Grupo "Libereco", Seifhennersdorf.

SENDU VIAJN INFANOJN

al nia Laborist-Infanhejmo Müden s. Oerte, Kr. Celle, Germanio.

● Tagprezo: 1.50 mk. g.

Etti Gräffe (11 014)

La Gekamaradoj, precipe redakcioj

de esp. laboristaj gazetoj, estas petataj sendi siajn eldonaĵojn k gazetojn por aranĝo de esperanto-fako ĉe Junsocialista Ekspozicio komence de junio en Tallinn. Adresu ĉion al K-do Erik Tuiman, *Tallinn* (Estonio), U. Kalamaja 3—13.

La ĉelo de SEU ĉe Centraj Ŝtatkursoj de Konstru-desegnistoj

dez. havi korespondadon kĉl., PK, PI, L, esp-aĵoj, gaz., ĵurn., ktp. Ĉe la ĉelo funkcias Radio- k Foto-rondetoj. La ĉelo havas junkomunistan, IRH-an, Ateistan ĉelojn. De 15. IV. ĝis 1. V. ni okazigos grandan ekspozicion por konvinki la laboristaron k gekursanaron pri la utilo de la lingvo. Tiucele ni bezonas materialon. Helpu, Gek-doj! Montru deziratan temon! Certe ni respondas al ĉiu sendinto! Ĉion adresu: Sovetio, *Moskvo*, Sretenka 27/29. Kursi Ĉertejnikov, Jaĉejka Esperanto.

RESP. GARANTIATA!

LABKOROJ

de metalfabrika gazeto "Kalininec" koresp. kun gelaboristoj el ĉl. esp.-, german-, anglalingve pri politika k ekonomia stato, vivo, laboro, klasbatalo. Interŝ. gaz., fotojn, afiŝojn ktp. Interesajn let. ni presos.

Adr.: **USSR, Leningrad, Poŝtkesto 18, al gaz. "Kalininec".**

Novosibirska grupo

ei SAT- k SEU-anoj dez. koresp. *kolektive* kun esper. grupoj proletaj de ĉ. l. pri organizmetodoj en esper. laborista movado, pri sociaj temoj (politikaj, ekonomiaj, kulturaj, literaturaj ktp.), interŝanĝi librojn, ĵurnalojn, ilustr., fotojn, PI, esperantaĵojn ktp. Adreso: *Novosibirsk*. Dvorec Truda, komnata 87. *Okruĵnomu Komitetu SESR*. Siberio. USSR.

Laborista junularo de la mondo!

Legu atente k respondu. Esperanto-ĉelo ĉe Profklubo dez. koresp. pri la junula movado, sporta vivo k pri div. sociaj, ekonom. k politik. temoj. Estas tre bonvenaj fotografaĵoj interŝanĝe. Resp. garant. *St. Sebrjakovo*, Jugo-Vostoĉ. ĵel. dor., klub imeni "Profinterna", al J. I. Popov.

FRANCIO

K-doj travojaĝontaj Parizon, atentu!

De nun la Pariza Lab. Esp. Grupo (FEO) kunvenas ĉiulunde (20.30-a h.), anstataŭ en la ĝis nuna ejo, en — Bourse du Travail (Annexe), 20, rue Bouloi, *Paris I-e*.

---

25 amikoj de esperanto

en la lernejo de Perec koresp. kĉl. pri proletinfana k lerneja vivo.

Adr.: *Gomel*, Ul. Karpoviĉa, 61. Al K-do Margolin.

ENHAVO:

	pаĝo
La evoluo sen dio	371—72
La militistigo de l' junularo en Italio	372
Ĉeeste kun grandaj spiritoj . . .	372
Por- kaj kontraŭ-militaj agadoj en Estonio	373
Notoj	373
La tragedio en usona malliberejo .	374
Pri kialo kaj celo de la vivo . .	374—75
Eklumoj sur Londonon	375
Por nia distro	375
Esperanto-Servo	376
Junulara Paĝo	377—78
Tra Esperantio	378—79
Korespondado, Anoncoj	379—80

Abontarifo al Sennaciulo: (La unua nombro montras jarabonon por membroj de SAT, la dua en krampoj montras la jarabonon por nemembroj. Ni ankaŭ akceptas ¼-jaran abonon.) **Argentino, pes. 5 (6); Aŭstrio, ŝil. 10 (12); Belgio, belgoj 10 (12); Brazilio, milrejs. 15 (18); Britio, ŝil. 8 (9); Bulgario, lev. 200 (250); Ĉeĥoslovakio, kr. 50 (60); Danio, kr. 8 (10); Estonio, kr. 7 (8); Finnlando, mk. 70 (80); Francio, fr. 35 (40); Germanio, mk. 8 (9); Hispanio, pes. 10 (12); Hungario, peng. 8 (10); Italio, lir. 40 (45); Japanio, jen. 4 (5); Jugoslavio, din. 100 (120); Latvio, lat. 8 (10); Litovio, lid. 15 (20); Nederlando, guld. 5 (6); Norvegio, kr. 8 (9); Polio, zlot. 12 (15); Portugalio, esk. 35 (40); Rumanio, lej. 300 (350); Sovetio, rubl. 4 (4,50); Svedio, kr. 8 (9); Svisio, fr. 10 (12); Usono, dol. 2 (2,50). — Ponumera prezo estas: 0,20 mk. g. = 0,25 fr. svis.** MONON ONI SENDU: rekte al la Administranto de SAT, **Richard Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig-O-27 (Germanio)**, poŝtĉek-konto 6835 aŭ pere de unu el la jenaj poŝtkontoj, ĉiuj je la nomo de R. Lerchner: Bruxelles, 227 848 — s'Gravenhage, 142 084 — Praha, 501 007 — Stockholm, 4268 — Warszawa, 191 335 — Wien-D, 137 725 — Zagreb, 40 040 — Kobenhavn, 14 938 — Zürich-VIII, 15 929 — La francianoj pagu al Sennacieca Asocio Tutmonda, 23 rue Boyer, Paris-XX, per la poŝtkonto 1234—22. — La sovetianoj al CK de SEU, poŝtkesto n-o 630, Moskvo. En landoj kie ni ne havas poŝtkontojn, oni pagu per **ŝtataj monbiletoj en registrita letero.**

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)